


ESPERANTO

REVUO INTERNACIA



D-ro L. L. ZAMENHOF
Gravuraĵo de Reto Rosetti

N-ro 637 (12)
Decembro 1958

**Universala
Esperanto-Asocio**

**(En Konsultaj Rilatoj kun
U.N.E.S.C.O.)**

esperanto

DECEMBRO 1958

5 1 a J A R O

REVUO INTERNACIA

N-RO 637 (12)

Fondinto: H. HODLER

Geredaktoroj: s-ino Kirsten Zacho kaj s-ro H. V. Rasmussen, cand. oecon.

Ĉion por la redakcio oni sendu al la Redakcia adreso: S-ino Kirsten Zacho, Randbølge 4, København, Danlando.

Ĉion pri administrado de UEA kaj de la revuo Esperanto (abonado, reklamoj, anoncetoj) sendu al UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO, Eendrachtsweg 7, Rotterdam-C., Nederlando. Telefono: Rotterdam 128313. Ĝirkonto: 378964 Ĉiu materialo por difinita numero devas atingi respektive la redakcion aŭ la Centran Oficejon (vidu supre) antaŭ la 1-a de la antaŭa monato.

Bankisto de U.E.A.:

R. Mees & Zoonen, Blaak 10, Rotterdam-C.

Traduko kaj represo de artikoloj estas permesataj, kondiĉe ke oni citu la fonton. Oni sendu tian represaĵon al nia redakcio.

Jara abono (1958): 9,50 n.gld. (kun membreco kaj jarlibro 12,50 n.gld.). Ĉefdelegitoj kaj Perantoj en multaj landoj.

Tarifo por reklamoj:

1 paĝo 128,— gld $\frac{1}{2}$ paĝo 64,— gld $\frac{1}{4}$ paĝo 32,— gld $\frac{1}{8}$ paĝo 16,— gld $\frac{1}{16}$ paĝo 8,— gld

Anoncetoj pri korespondado:

0,10 gld por unu vorto aŭ 1 int. respondkupono por ĉiu duo da vortoj.

Legantoj en 80 landoj.

Estraro de U.E.A.:

Prof. D-ro Giorgio Canuto, prezidanto, Via Chiabrera 37, Torino.

Prof. D-ro Ivo Lapenna, ĝenerala sekretario, 77, Grasmere Avenue, Wembley, Middlesex, Britujo.

H. W. Holmes, O.B.E., vic-prezidanto, 38, Fillebrook Road, London E 11, Britujo.

R. Llech-Walter, estrarano pri financoj, 5 Quai Vauban, Perpignan (Pyr. Or.), Francujo.

D-ro Inĝ. Giordano Azzi, estrarano pri kulturaj aferoj, viale Giulio Cesare 20, Como, Italujo.

D-ro W. Herrmann, estrarano pri landaj kaj fakaj asocioj, Bürstädterstr. 3, (16) Lampertheim-Hessen, Germanujo.

Centro de Esploro kaj Dokumentado

77, Grasmere Avenue, Wembley, Middlesex, Britujo, Telefono: ARNold 90-81.

Serva Centro, Palais Wilson Genève. Svislando.

Honora Administranto: Hans Jakob. Telef. 32.30.34.

Enhavo

Ĉe la sojlo de la Zamenhof-jaro	185
Deklaracio	186
Baza Programo	187
Alvoko	188
Festo aŭ Fasto de l'libro	188
Parolado de s-ro René Llech-Walter	190
Komuniko pri la I.P.K.	190
S-ino M. Haudebine al Hindujo	191
Dekjara datreveno de la U.D.	192
Promenado tra Varsovio	193
Esperantismaj Problemoj	195
Grava peto al ĉiuj	198
Kiu estis s-ino Bassols?	198
Korekto	198

Rubrikoj:

44-a U.K. de Esperanto	196
La internaciaj konkursoj 1958	196
Novaj libroj	197
La juna Vivo	198
Tra la mondo	199
Oficiala Informilo	199
Radio	199

Manuskriptoj por "Esperanto" estu liveritaj al la redakcio en du ekzempleroj. Ili devas esti klare tajpitaj en perfekta Esperanto. Oni skribu sur nur unu flanko de la papero (prefere en normformato A4), kun interlinia spaco kaj kun larĝa margeno maldekstre. Supersignitaj literoj devas havi la ĝustajn supersignojn, se necese permane aldonitajn. Neuzotajn manuskriptojn oni resendas nur kontraŭ afranko aŭ respondkupono.

OFICIALA ORGANO DE UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO

(EN KONSULTAJ RILATOJ KUN U.N.E.S.C.O.)

REVUO
esperanto
INTERNACIA

51 a Jaro

1958

Redaktoroj:

Mag. William Auld, cand. oecon. H. V. Rasmussen, Kirsten Zacho

Oficiala organo de

UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO

(en konsultaj rilatoj kun U.N.E.S.C.O.)

Administracio :

Eendrachtsweg 7, ROTTERDAM-C., Nederlando

Redakcio :

**Kirsten Zacho, Randbølvej 4, KOPENHAGO F.,
Danlando**

Enhavo 1958

Al D-ro Kalocsay	159	Eksterlandtelefonadoj sen lingvoscipovo	44
Al la legantoj	154	El la lando Hispanujo. <i>John Masefield</i> . trad.	162
Alta honorigo de G. Canuto	155	A. J. L. H.	30
Alvokoj 3, 75, 109,	145	El la redakcio	116
Alvoko al ĵurnalistoj	33	Enketo pri Esperanto. Komuna Konversacia Klubo. Danlando	195
Alvoko al la tutmonda esperantistaro	188	Esperantismaj problemoj. <i>Hans Jakob</i>	181
Alvoko al zoologoj	72	Esperantista Vivo 3, 33, 109,	29
Anoncetoj 17, 37, 53, 93, 113, 128, 152, 185,	200	Esperanto-Domo en Aŭstrio	94
Araneo. <i>J. H. Rosbach</i>	177	Esperanto en la scienco. <i>G. F. Makkink</i>	170
Arto en la lernejoj	80	Esperanto en U.N.	174
Azio malfermas novajn horizontojn.		Esperanto kiel instrulingvo. <i>Vilho Setälä</i>	6
<i>Tibor Sekelj</i>	171	Esperantujo en Bildo kaj Sono	143
Baza programo por aranĝoj en la Zamenhof-jaro	187	Fakaj kaj neneŭtralaj organizaĵoj	188
Beethoven kaj la samtempuloj.		Festo aŭ fasto de l'libro. <i>P. Thorsen</i>	142
<i>Adolphe Boschot</i>	123	Festo jubilea por prof. d-ro Ivo Lapenna	3
Belarta konkurso . . . 4, 7, 15, 141, 155, 177,	181	Filma Servo de U.E.A.	185
CED :		Fondaĵo Zamenhof 127, 149, 168,	
Bibliografio de la internacia lingvo	79	Flankaj frontartikoloj :	
Biografiaj informoj pri D-ro L. L. Zamenhof	183	Angla Antologio	17
Esperanto denove en la publikaĵoj de Unesko	2	En Mainz apud la bela Rejno	78
Kio instigis vin lerni Esperanton ?	97	Esperanto en U.N. <i>Eskil Svane</i>	153
Mallongaj informoj 2,	183	La esperantlingva reklamo	37
Materialoj por Index Translationum	97	La familio A. P. Ganto	3
Plia eldono de la dokumento CED/5 en angla	2	La ŝlosilo estas en viaj manoj	93
Radioelsendoj en 1957	79	La venko en Montevideo	113
Statistiko pri premiitoj	154	Nia statistiko. <i>M. H. Vermaas</i>	169
U.E.A. en grava dokumento de Unesko	183	Tiuj versaĵoj. <i>P. Thorsen</i>	155
Ĉefartikoloj :		Gazetara Servo	147
Al 50.000 membroj. <i>Kirsten Zacho</i>	153	Geonkloj Esperantistaj	154
Ĉe la sojlo de la Zamenhof-jaro. <i>I. Lapenna</i>	185	Geografia rondo esperantista en Pollando	86
Ĉu prefere nacilingvo ? <i>William Auld</i>	37	Germanaj katedraloj	26
Decidoj de la Printempa Estrara Kunsido.		Grajnoj en Vento	53
<i>I. L.</i>	77	Grava peto al ĉiuj	198
La fondiĝo de U.E.A. <i>I. Lapenna</i>	53	Grésillon	73
La graveco de la lokaj grupoj. <i>I. Lapenna</i>	169	Impona ekspozicio en Brazilo	173
La plej amikeca Universala Kongreso.		Internacia Geografia Asocio	73
<i>I. L.</i>	129	Internacia konkurso	
La preparlaboroj por la Zamenhof-jaro.		14, 25, 44, 73, 91, 106, 115, 150, 167, 176,	196
<i>I. L.</i>	1	Internacia Lerneja Sportkonkurso	32
Profesoro D-ro Ivo Lapenna. Jubileoj.	113	Internacia lingvo por infanoj	100
Unu fojon en cent jaroj. <i>I. Lapenna</i>	93	Internacia Organiza Komitato 117,	189
27.093 <i>M. H. Vermaas</i>	17	Internacia Patrona Komitato	118
Ĉefaj decidoj de la komitato kaj estraro	138	Internacia premio	109
Ĉefkunveno de I.A.J.E. en Mainz	170	Intervjuo kun A. F. Scott	8
Deklaracio de la Homaj Rajtoj	192	Ivo Lapenna - Vivo kaj laboro	114
Deklaracio okaze de la Zamenhof-jaro	186	Jarlibro de U.E.A.	127
Diservoj	144	Jubilea festprogramo	135
Du gravaj fakaj kunvenoj	144	Kiu estis S-ino Bassols ?	198
Delegitoj 112, 125, 150, 168,	185	Kiun verboformon uzi ? <i>W. P. Roelofs</i>	156
Diskuto pri Esperanto. <i>Sándor Szathmári</i>	95		

Komuniko pri la I.P.K.	190	Nekrologoj	33, 34, 74, 198
Kongresoj Universalaj : 41-a	4	Nepalaj Bronzoj. <i>Tibor Sekelj</i>	40
43-a 6, 28, 38, 75, 95, 105,	125	Nia Forumo	13, 18
44-a	182, 196	Nova etapo de Ĉina Esperantomovado	48
Kongreso 31-a de S.A.T.	160	Novaj fortoj en la gazetaro	90
Kongresa festparolado de I. Lapenna	130	Oficiala Informilo	
Kongresoj en la gazetaro	33	15, 34, 51, 76, 92, 112, 125, 150, 168, 184,	199
Koresponda Servo Mondskala 31, 46, 76, 90,	105	Okcidenta kaj Orienta Kulturoj	122
Kulturaj Aranĝoj	139	Omaĝe al la memoro de	
Kulturdomo Esperantista	47	d-ro Stanislav Kamarýt	19
Kvinjara jubileo de esperantoelsendoj en		Oratora Konkurso. 1958	18
Zagreb	72	Ostankowicz, Czeslaw : Celstacio	39

La juna Vivo :

Ankoraŭ pri la 6-a junulara festivalo	12
Ĉekoslovaka esperantista junularo	110
Du gazetoj por la junularo	27
Esperantista Seminario en Prago	27
Esperantista junularo en Milano	110
Esperanto kaj civilservo	13
Eŭropa Domo en Marienberg	85
Fondiĝo de studenta ligo	159
Homburg	71, 85, 110
Internacia junularkongreso en Berlino	71
Internacia junularkunveno de T.E.J.O. 12,	49
Internacia seminario de germana	
Esperantojunularo	49
Jarfinaj pensoj	198
Junularo de la mondo	86
Kiu volas esti junulara delegito ?	175
Konkursoj	111
Labor-Kampo ĉe Ceillac	27
Laborkampoj internaciaj dum 1958-a	111
La 14-a internacia junulara kunveno de	
T.E.J.O.	157
Mallongaj informoj	13, 111
Moskva junularo	111
Nova jaro komenciĝas	12
Novaĵoj el Zagreb	27
Skiferioj	50, 158, 175, 198
Somera Esperanto-tendaro en Ĉekoslovakio	27
Speciale por protestantaj gejunuloj	86
Speciale por studentoj	13
La 17-a regulo. <i>H. V. Rasmussen</i>	176
La germana federacia fervojo en U.K.	145
La grupoj, kerno de nia movado	7
La ĝeneralaj kunvenoj de U.E.A.	134
La infana kongreseto	146
La kongresejo	145
La laboro de la sekcioj	133
La lingva ĥaoso	15
La Nibelungoj	45
La solena inaŭguro de 43-a U.K.	130
Leteroj al la redakcio	182
Lingva eksperimento en Arnhem	156
Magnetofona Servo de U.E.A.	31, 154, 180
Mallongaj informoj	2, 50, 71, 86
Monda galerio. <i>W. Włodarczyk</i>	98
Mondekspozicio Brusela 1958	111

Novaj libroj :

Auld, William kaj Rosetti, Reto :

Angla Antologio	81
<i>Adema, Tjeerd</i> : Dekkinga fuĝas	10
<i>Applebaum, J. D.</i> : Jozefo	107
<i>Boulton, Marjorie</i> : Cent Ĝojkantoj	166
<i>Broadribb, R. Donald</i> : A Supplement to the	
Esp.-English Dictionary of Millidge	11
<i>Cresswell, John kaj Hartley, John</i> : Teach	
yourself Esperanto	10
<i>Esperanto Press, Oakville</i> (eld.) : 1) Mia	
frateto 2) Domoj 3) Lanĝo montras la	
vojon 4) Penjo kaj ŝiaj amikoj	84
<i>Forné, J. Juan</i> : La aperoj de la Sankta	
Virgulino	197
<i>Gray, W. S.</i> : Ni legas bildojn	107
<i>Hemert-Remmers, Jo van</i> : Sur insulo	
malproksima	10
<i>J. J. F.</i> : Ni oferas	197
<i>Japana Esperanta Librokooperativo</i> :	
De japanaj studentoj	107
<i>Jónsson, Magnus</i> : Kennslubok i Esperanto	167
<i>Kao, Johano Baptisto</i> (kompil.) : Memorlibro	
de la Esperantista Eŭkaristia Mondkun-	
veno	11
<i>Lapenna, Ivo</i> : Retoriko	166
<i>Léger, Roger</i> : Lexique Fondamental	
Esperanto-Français	165
<i>Martinus</i> : Folioj el la Bildolibro de Dio	197
<i>Murgin, Canko</i> : Kantoj por la paco	167
<i>Neergaard, Paul</i> : La vivo de la plantoj	164
<i>Ney-Felix</i> (trad.) : Al Dio sonu nova kant'	166
<i>Petrovič, Svetislav S.</i> : Sonetkrono por la	
esperantistaro	107
<i>Prus, Boleslaw</i> : La Faraono	9
<i>Rosher, E. M.</i> : Lignaj juntoj ilustritaj	10
<i>Sienkiewicz, Henryk</i> : Quo Vadis. Trad.	
Lidia Zamenhof	164
<i>Steiner, Hugo</i> : Katalogo pri la kolektoj de	
IEMV	83
<i>Ŝimomura, Joŝiŝi</i> : Japanaj Fabeloj	84
<i>Ŝupichova, Julie</i> : Ni legas kaj lernas	197
<i>Tuwim, Julian</i> : Versaĵoj propraj kaj	
tradukitaj	166
<i>Wagner, George E.</i> : La seĝo dektria	181
<i>Waringhien, G</i> : Grand Dictionaire	
Esperanto-Français	165

Panglottia. D-ro V. T. Mišková	96
Parolado de s-ro Llech Walter	190
Progresoj kaj Mankoj de nia Movado.	
<i>I. Lapenna</i>	119
Projektoj de filmo pri Zamenhof	148
Promenado tra Varsovio. <i>Jadwiga Rydygier</i>	193

Poezio :

<i>Auld, William</i> tradukis : Finvorto de virino	159
<i>Auld, William</i> : Pensoj post Montevideo . .	116
<i>Azzi, G.</i> : Al urbestro Stein	129
<i>Boulton, Marjorie</i> : Venuso kaj vulkano . .	7
<i>Guglielminetti, C. C.</i> : Kantiko por mia Kreitaĵo	177
<i>Holmes, Harry</i> : La laboranta reĝo, trad.	178
<i>Mattos, Geraldo</i> : Fiat Nox	5
<i>Oyarzabal, J. de</i> : Sonateto	5

Prozo :

<i>Grum, Jerzy</i> : Celstacio	39
<i>Hughes, A. J. L.</i> : El la lando Hispanujo. Trad.	162
<i>Kock, Edwin de</i> : Vekiĝo	4
<i>Ritterspach, G.</i> : La Nibelungoj	45
<i>Rosbach, Johan H.</i> : Araneo	177

Radio:	32, 74, 91, 105, 124, 149, 160, 181,	199
Radiobabiloj	42,	106
Reĝa Dekreto por U.E.A.		102

Seminario por Cseh-metodaj instruistoj . .	28
SinJORino Haudebine al Hindujo	191
Solena Fermo	148
Statistiko	46
Stenografio kaj Esperanto en ĈSR	34
Ŝaka rubriko	29, 74, 104

Tra la mondo :

Aŭstrujo	4,	41
Brazilo	41, 87,	89
Britujo	14, 41, 87, 88, 89, 102, 104,	199
Belgujo	87,	199
Bulgarujo	14, 41, 87,	102

Ĉekoslovakio	87,	88
Danlando	87, 88, 102,	199
Francujo	14, 41, 87, 88, 103,	104
Germanujo	41, 87, 88,	89
Hispanujo	14, 87, 88,	89
Hungarujo	14, 41, 87, 88, 89,	199
Israelo		87
Italujo	87, 102,	180
Japanujo		180
Jugoslavio	14, 41, 103,	104
Latvujo		102
Litovio		43
Montevideo		102
Nederlando	87,	103
Nov-Zelando		14
Pollando	14, 87, 102, 180,	199
Portugalujo		14
Sovetunio		199
Svedujo	14, 41,	88
Svislando	98,	102
Usono		88

U.E.A. :

<i>Figliera, G. C.</i> : U.E.A. kiel organizanto de mondinformado	66
<i>Holmes, H. W.</i> : La apliko de moderna tekniko al nia agado	69
<i>Jakob, Hans</i> : La help-agado de U.E.A. 1914-18	55
<i>Lapenna, I.</i> : Konstruado de fortika U.E.A. 1948-58	61
<i>Malmgren, E.</i> : Internacia Esperanto-Ligo	60
<i>Privat, E.</i> : Esperanto ĉe la Ligo de Nacioj	57
<i>Privat, E.</i> : Kiel Hodler fondis U.E.A. . .	54
<i>Vermaas, M. H.</i> : Montevideo kaj ĝiaj sekvoj	68
<i>Vermaas, M. H.</i> : La delegita reto	65

Universala ekspozicio	147, 161,	174
Unuiĝo de internaciaj asocioj		170
Vekiĝo. Edwin de Kock		4
Zamenhof-jaro		137



ĈE LA SOJLO DE LA ZAMENHOF-JARO

La preparlaboroj por la aranĝoj en la Zamenhof-Jaro, iniciatitaj antaŭ pluraj monatoj, estas preskaŭ finitaj. En tiu ĉi numero de nia revuo ni publikigas la fundamentajn dokumentojn, kiuj prezentas la plej larĝan kadron por la agado de ĉiuj Esperanto-organizaĵoj kaj de ĉiu unuopa esperantisto.

La universaleco de la Esperanto-Movado klare respeguliĝis en la konsisto de la Internacia Organiza Komitato kaj de ĝia Prezidentaro. En ĝi estas reprezentitaj ĉiuj kontinentoj, landoj kun malsamaj ekonomiaj-sociaj kaj politikaj sistemoj, diversaj religioj, profesioj, fakoj kaj okupoj. Aparte rimarkinda estas la nombro de lingvistoj. El la dek vicprezidentoj, kvin estas elstaraj sciencistoj-lingvistoj, mondkonataj en sia fako. Ĉiuj, kompreneble, regas la Internacian Lingvon. Fakte, donanta per si mem trafan respondon al tiuj miopuloj aŭ ignorantoj kun titoloj, kiuj ankoraŭ kuraĝas "aŭtoritate" paroli kaj skribi fantaziaĵojn pri afero al ili tute nekonata!

La Internacia Patrona Komitato, en kiun jam eniris multaj altrangaj personoj de la scienco, literaturo, artoj, ĝenerale de la publika vivo, kulturo kaj edukado, havas similan universalan karakteron. En ĝi troviĝas ĉefministroj, ministroj kaj prezidentoj de parlamentoj; al ĝi aliĝis sciencistoj, verkistoj kaj artistoj, kies meritoj por la kulturo larĝe transpasas la limojn de iliaj landoj. La Internacia Patrona Komitato donas pli grandan prestiĝon al la planitaj festoj kaj aranĝoj.

En la hodiaŭa mondo de disŝiraj antagonismoj estas tre malfacile, preskaŭ maleble, trovi komuncelan dokumenton, sub kiu apudstaras subskriboj de personoj, apartenantaj al tiel malsamaj sistemoj! Tial, eĉ la nura konsisto de la Internacia Organiza Komitato kaj, ankoraŭ pli, de la Internacia Patrona Komitato estas per si mem iusence omaĝo al D-ro L. L. Zamenhof, al lia genia verko kaj al la noblaj ideoj, kiuj inspiras ĝin: egaleco de ĉiuj nacioj kaj individuoj ankaŭ sur la lingva kampo, toleremo, aprezado de efektivaj kulturaj valoroj senkonsidere al la lingvo, religio kaj nacieco de iliaj kreintoj, lingva kompreniĝo kiel bazo de reciproka respektado kaj interkompreniĝo spirita.

Tiu konsisto, plue, montras la korektecon de la maniero, laŭ kiu estis evoluigata la lingva kaj ideo heredaĵo de D-ro Zamenhof, por ke ĝi atingu la nuntempan stadion kaj karakteron de apartenaĵo monda. Fine, tiu konsisto pruvas ankoraŭfoje la principan gravecon de aktiva — ne senidee kaj senenhave pasiva — neŭtraleco de Universala Esperanto-Asocio por la plua antaŭenigo de la Internacia Lingvo.

La Deklaracio estas direktita al la ekstera mondo. La landaj asocioj kaj la aliaj kunlaborantoj en diversaj regnoj prizorgos, ke ĝi, en multaj naciaj lingvoj, atingu la adresitojn kune kun la kompleta nomaro de la personoj apartenantaj al la IPK.

La Baza Programo donas la ĉefajn, komune interkonsentitajn erojn de unueca plano, efektivigota en la tuta mondo. Reflektante la karakteron kaj organizan strukturon de la neŭtrala unueca Esperanto-Movado, la programo antaŭvidas agadon sur tri niveloj: internacia, landa kaj loka. Tial, kelkaj eroj de la programo devas esti — kaj certe estos — plenumitaj de la organoj de UEA, dum la aliajn devos realigi la organoj de la landaj asocioj kaj la lokaj societoj, aŭ kelkrilate la fakaj organizaĵoj kaj unuopuloj, eĉ izoluloj.

Precize la graveco de la kunlaborado de ĉiuj estas akcentita en la *Alvoko al la Esperantistaro*, kiun ĉiu tralegu atente kaj agu konforme.

La tuta senco de ĉiuj planitaj aranĝoj estas ne nur esprimi plej dignan omaĝon al la aŭtoro de la Internacia Lingvo, sed ankaŭ samtempe doni fortan puŝon antaŭen al Esperanto ĉie en la mondo. Efike kaj grandskale disvastigante la Internacian Lingvon en ĉiuj medioj kaj per ĉiuj rimedoj de informado, samtempe instruante ĝin al miloj kaj miloj da personoj kiuj ĝin bezonas, oni plej taŭge memorigos la 100-jaran datrevenon de la naskiĝo de D-ro Zamenhof.

Tiucele ni ĉiuj streĉu niajn fortojn kaj intensigu nian komunan agadon ĝis maksimumo en tiu ĉi Jubilea Jaro.

I. L.

LARĜE KONTRIBUU AL FONDAĴO - ZAMENHOF!

DEKLARACIO

Okaze de la 100-jara datreveno de la naskiĝo de d-ro L. L. Zamenhof

La 15-an de decembro 1959 estos la 100-jara datreveno de la naskiĝo de D-ro L. L. Zamenhof.

Inspirita de profunda humanismo kaj konscia, ke la diverseco de lingvoj prezentas la fundamentan obstaklon al ĉiuj aspektoj de internacia komunikado kaj, sekve, ankaŭ al pli bona kompreniĝo inter la popoloj, L. L. Zamenhof dediĉis sian grandan talenton kaj ĉiujn siajn fortojn al la solvo de tiu problemo.

En la jaro 1887 aperis en Varsovio la unua lernolibro de Internacia Lingvo, kiun li publikigis sub la pseŭdonimo "Esperanto", laŭ kiu ankaŭ la lingvo estis poste ofte nomata.

En iom pli ol nuraj sep jardekoj la lingvo disvastiĝis tra la tuta mondo kaj fariĝis en niaj tagoj senduba socia fakto kaj grava kultura faktoro.

Ĉiujare 10.000 ĝis 15.000 personoj, apartenantaj al plej malsamaj lingvaj komunajoj, kolektiĝas en diversaj internaciaj kongresoj, konferencoj, seminarioj kaj aliaj aranĝoj utiligante por la raportoj, lekcioj, prelegoj, diskutoj kaj personaj kontaktoj nur la Internacian Lingvon. Ĉi tiuj estas la solaj internaciaj renkontiĝoj de la hodiaŭo, dum kiuj la komunikado okazas ne nur sen interpretistoj, sed ankaŭ sen humiliĝoj, surbaze de plena egaleco, per la uzo de unu nura neŭtrala lingvo.

Nekalkulebla nombro da homoj, el ĉiuj sociaj tavoloj, daŭre efektivigas per la Internacia Lingvo skribajn kontaktojn trans ĉiujn lingvajn limojn.

La scienca kaj belarta literaturo en la Internacia Lingvo — kaj traduka kaj originala — estas jam tre multflanka kaj valora. Novaj libroj senĉese aperas. Konsiderinda nombro da gazetoj kaj fakaj revuoj estas regule publikigata en Esperanto. La apliko de la lingvo en la scienco kaj por fakaj celoj konstante vastiĝas.

En radio, turismo, komerco kaj en aliaj sferoj Esperanto akiras novajn poziciojn.

Paralele la lingvo interne evoluis laŭ la sama maniero, laŭ kiu evoluas kiu ajn literatura lingvo, sed samtempe, pro la daŭra intensigado de la internaciaj kontaktoj, ankaŭ plifirmiĝis ĝia unueco kaj kohereco.

Per sia Rezolucio de la 10-a de decembro 1954 la Ĝenerala Konferenco de U.N.E.S.C.O. diskutinte la Raporton de la Ĝenerala Direktoro de tiu organizaĵo, "notis la rezultojn atingitajn per Esperanto sur la kampo de la internaciaj intelektaj interŝanĝoj kaj por la proksimigo de la popoloj" kaj rekonis, "ke tiuj rezultoj respondas al la celoj kaj idealoj de U.N.E.S.C.O."

La praktika apliko de Esperanto montris, ke la fundamenta baro al internacia komunikado kaj kunlaborado — la lingva obstaklo — estas venkita por tiuj, kiuj scias la Internacian Lingvon. Tiu obstaklo estas, same tiel, venkebla por ĉiuj aliaj. Necesas nur bona volo kaj iom da fortostreĉo por ellerni la lingvon.

Dum la tuta jaro 1959 okazos ĉie tra la mondo diversaj aranĝoj por memorigi la 100-jaran datrevenon de la naskiĝo de D-ro L. L. Zamenhof. Por kunordigi tiun agadon, kiu atingos sian kulminon la 15-an de decembro 1959, formiĝis speciala Internacia Organiza Komitato, kiu laboras sub la aŭspicioj de Internacia Patrona Komitato, en kiun eniris elstaraj personecoj de la scienco, literaturo kaj ĝenerale kultura kaj publika vivo de diversaj landoj.

La Internacia Organiza Komitato direktas

ALVOKON

*al ĉiuj internaciaj ŝtataj kaj privataj organizaĵoj;
al ĉiuj internaciaj kaj naciaj sciencaj, literaturaj,
klerigaj, kulturaj, komercaj kaj aliaj institucioj;
al ĉiuj direkcioj de televido kaj radio;
al la redakcioj de gazetoj kaj revuoj;
al profesoroj kaj instruistoj kaj al ĉiuj aliaj kulturaj agantoj*

memorigi en konvena formo la 100-jaran datrevenon de la naskiĝo de D-ro L. L. Zamenhof kaj doni sian helpon kaj apogon por la plua disvastigo de la Internacia Lingvo Esperanto.

La Internacia Organiza Komitato turnas sin rekte al ĉiu persono, kiu mem spertis la malfacilaĵojn de la lingva obstaklo en la internaciaj rilatoj, ellerni senprokraste Esperanton kaj tiamaniere ne nur mem utiligi la multnombrajn avantaĝojn, kiujn donas la scio de tiu lingvo, sed ankaŭ kontribui al ĝia disvastigo. Ju pli granda estas la nombro de personoj, kiuj scias kaj uzas la Internacian Lingvon, des pli granda estas ĝia valoro kaj des pli utila fariĝas la scio de la lingvo por ĉiu unuopa individuo.

Esperanto ne devas anstataŭigi la ekzistantajn naciajn lingvojn, sed forigi la lingvan ĥaoson en la internaciaj rilatoj servante al ĉiuj kiel neŭtrala instrumento de internacia komunikado.

En Mainz, la 5-an de aŭgusto 1958.

Internacia Organiza Komitato

BAZA PROGRAMO

DE LA ARANĜOJ OKAZE DE LA ZAMENHOF-JARO

La Internacia Organiza Komitato akceptis, dum sia kunsido de la 5-a de aŭgusto 1958 en Mainz, jenan Bazan Programon de la aranĝoj en la Zamenhof-Jaro :

1. Disvastigo de la verko de Prof. E. Privat pri la vivo de Zamenhof kaj eventuale de aliaj biografiaj verkoj pri Zamenhof en Esperanto kaj en kiel eble multe da naciaj lingvoj.
2. Speciala dokumento pri la vivo kaj verko de Zamenhof en Esperanto kaj en kiel eble plej multaj naciaj lingvoj (prizorgota de la Centro de Esploro kaj Dokumentado, Londono).
3. Serio da dokumentoj pri Zamenhof kaj la Internacia Lingvo, eldonotaj de la Centro de Esploro kaj Dokumentado dum la tuta jaro 1959.
4. La Centro de Esploro kaj Dokumentado liveros rekte al la mondaj presagentejoj kaj al siaj kunlaborantoj (por traduko kaj publikigo en naciaj lingvoj) artikolojn pri Zamenhof, verkitajn de la plej elstaraj personoj de diversaj landoj, precipe lingvistoj, kiuj parolas la Internacian Lingvon. Se iel eble, tiuj artikoloj estos publikigitaj ankaŭ en formo de libro fine de la jaro 1959.
5. La Informa Fakto de Universala Esperanto-Asocio liveros dum 1959 informojn pri Zamenhof kaj la lastjaraj progresoj de la Internacia Lingvo al la Informaj Faktoj de la landaj Esperanto-organizaĵoj kaj al la mondaj presagentejoj por publikigo en la nacilingvaj gazetoj kaj revuoj.
6. Speciala kampanjo en televido kaj radio, utiligante tiucele precipe la radio-staciojn, kiuj jam elsendas en la Internacia Lingvo.
7. Specialaj festoj dum la Universala Kongreso de Esperanto en la Jubilea Jaro en Varsovio, 1959.
8. La internaciaj Esperanto-revuoj dediĉu la tutan decembran numeron 1959 al la aŭtoro de Esperanto. En januaro, 1959, aperu enkondukaj artikoloj pri la Zamenhof-Jaro.
9. La estraroj de la landaj Esperanto-organizaĵoj publikigu nacilingve specialan numeron de sia gazeto kun artikoloj pri la vivo kaj verko de Zamenhof en kiel eble plej multe da ekzempleroj kaj prizorgu ĝian vastan distribuon.
10. Ĉiuj Esperanto-kongresoj — landaj, fakaj kaj specialaj — havu solenajn kunsidojn (kun prelegoj, muzikaj punktoj, deklamadoj k.s.) dediĉitajn al Zamenhof. Personoj, parolantaj la Internacian Lingvon, memorigu la datrevenon ankaŭ en aliaj internaciaj aŭ naciaj kongresoj kaj konferencoj.
11. Ĉiuj lokaj Esperanto-grupoj en la mondo organizu la tagon mem de la datreveno alt-nivelajn publikajn aranĝojn en la plej belaj salonoj, laŭ la ebleco en kunlaboro kun gravaj kulturaj institucioj kaj organizaĵoj de la loko, kaj invitu la ĵurnalistojn, la reprezentantojn de la lokaj, provincaj aŭ ŝtataj kulturaj institucioj kaj edukaj instancoj (detaloj pri tiuj festoj estu donitaj de la landaj Esperanto-organizaĵoj; sugestoj estos donitaj de la Kultura Komisiono de Universala Esperanto-Asocio).
12. Jubileaj poŝtmarkoj, eldonotaj en kiel eble plej multe da landoj.
13. La landaj Esperanto-organizaĵoj kaj la lokaj Esperanto-societoj klopodu atingi, ke en kiel eble plej multe da lokoj po unu strato aŭ placo ricevu la nomon de "Zamenhof, aŭtoro de la Internacia Lingvo Esperanto" aŭ "Esperanto". La fakto, ke jam ĉirkaŭ 100 urboj havas stratojn aŭ placojn je la nomo "Zamenhof" aŭ "Esperanto", faciligos tiun klopodon. Oni ankaŭ klopodu starigi monumentojn al D-ro L. L. Zamenhof imitante plurajn urbojn, kiuj tion jam faris.
14. Publikigo de dokumenta filmo pri Zamenhof kaj lia verko (prizorgota de Pollando).
15. Laŭ la ebleco eldono en 1959 de kompleta bibliografio pri la verkoj publikigitaj en la Internacia Lingvo.
16. Eldono de memorigaj glumarkoj kaj foto en pluraj formatoj de D-ro L. L. Zamenhof (prizorgota de Universala Esperanto-Asocio).
17. Ĉiuj festoj kaj aranĝoj — ĉu en lokaj, ĉu en landaj, aŭ internacia kadro — estu vaste utiligataj por plia informado pere de la gazetaro, radio, ekspozicioj, afiŝoj, flugfolioj kaj aliaj rimedoj laŭ la landaj kaj lokaj cirkonstancoj.

En Mainz, la 5-an de aŭgusto 1958.

La Internacia Organiza Komitato por la aranĝoj okaze de la 100-jara datreveno de la naskiĝo de D-ro L. L. Zamenhof aprobis dum sia kunsido de la 5-a de aŭgusto la definitivan bazan programon. La programo antaŭvidas diversajn aktivecojn dum la tuta jaro kun la kulminaj punktoj en aŭgusto 1959 dum la Universala Kongreso en Varsovio kaj, speciale, la 15-an de decembro 1959. Ĉiuj aranĝoj troviĝas sub la aŭspicioj de speciala Internacia Patrona Komitato, en kiun eniris elstaraj personoj de la scienco, literaturo kaj ĝenerale kultura kaj publika vivo de diversaj landoj.

Por ke la Jubilea Jaro 1959 estu festata kiel eble plej sukcese ĉie en la mondo kaj por ke tiamaniere estu ne nur esprimita digna omaĝo al la memoro de la aŭtoro de Esperanto, sed ankaŭ utiligata tiu okazo por plua intensa disvastigo de la lingvo, estas necese, ke absolute ĉiuj Esperanto-organizaĵoj kaj ĉiuj unuopaj esperantistoj kunlaboru en la ĝeneralaj kadroj de la programo kaj kontribuu ĝis maksimumo al la sukceso.

Tial la Internacia Organiza Komitato turnas sin al ĉiuj landaj, fakaj kaj specialaj Esperanto-organizaĵoj, kiel ankaŭ al la lokaj Esperantistaj societoj, grupoj kaj kluboj kun la alvoko plenumi

tiujn partojn de la programo, kiuj apartenas al ilia kompetenteco.

La Internacia Organiza Komitato insiste admonas, ke absolute ĉiuj publikaj aranĝoj — prelegoj, literaturaj vesperoj, ekspozicioj k.s. — estu ankaŭ laŭ la ekstera formo sur la plej alta nivelo kaj nepre en konvenaj ejoj.

La Internacia Organiza Komitato alvokas ĉiun unuopan esperantiston ne nur helpi al sia loka, landa aŭ faka organizaĵo en ĝia laboro rilate la aranĝojn, sed ankaŭ mem intensigi sian aktivecon dum la tuta jaro 1959 diskonigante la lingvon inter la gekonatoj, farante prelegojn en la medio de sia laboro aŭ aliloke laŭ la cirkonstancoj, instruante la lingvon eĉ nur al malgrandaj grupoj, verkante artikolojn por siaj fakaj revuoj kaj laŭ aliaj manieroj. Plue, ĉiu esperantisto kontribuu finance laŭ siaj eblecoj al la Fondaĵo-Zamenhof, kiu estas starigita de UEA. Donacojn por tiu fondaĵo oni povas sendi aŭ al la Centra Oficejo de UEA en Rotterdam aŭ al la ĉefdelegitoj kaj perantoj de UEA en diversaj landoj.

Per la laboro de ĉiuj la Internacia Lingvo faru decidan pluan paŝon antaŭen en la Jubilea Jaro 1959!

En Mainz, la 5-an de aŭgusto 1958.

Festo aŭ fasto de l'libro

Dum la UK en Dancigo 1927 Julio Baghy proponis, ke la 15-a de decembro — naskiĝotago de Zamenhof — estu la tago de la Esperanto-literaturo. La kongreso entuziasme akceptis, kaj de tiam ĉiu "vera" esperantisto konsideras sia morala devo aĉeti minimume unu libron en decembro.

Tamen, se oni kritike ekzamenas la supran historian fakton, oni konfesu, ke delonge ne sufiĉas tia modesta programo. Unue estas tro duba la nombro de "veraj" esperantistoj, due nuntempe funkcias pli ol 30 esp-eldonejoj, el kiuj pluraj publikigas pli ol unu libron jare. — Sole pro statistikaj motivoj la konscienco de s-ano

Mezo Zamenhofa do tute ne plu rajtas trankviliĝi per aĉeto de unu sola verko.

Laŭ la alte taksinda bibliografio de W. Auld aperis dum 1945-57 entute 1072 diversaj libroformaj verkoj en la internacia lingvo. Interese kaj impone. Sed estus ankoraŭ pli interese, se ekzistus tabelo pri ekzemple 1) la nombro de presitaj ekzempleroj, 2) efektive venditaj ekzempleroj, 3) financa rezulto, 4) nombro de re-eldonitaj verkoj.

Unu grava eldonejo intermilita kuraĝis presigi nur 600 ekzemplerojn, nombro rekte perdiga. Nuntempe la plej kutima nombro kredeble oscilas ĉirkaŭ 1000 ekz-

oj, tro modesta cifero, se oni konsideras, ke la internacia lingvo havas kiel merkaton la tutan mondon. Ĉiu fakulo povas atesti, ke nur eldon-nombro de 2000 aŭ pli — kaj prefere kompreneble la re-eldonoj — signifas profiton. Sed ĝuste la re-eldonado estas unika en Esperantujo.

Ĉu ne estas tiel, ke preskaŭ ĉiu esp-libro eldonita dum la lastaj jardekoj ankoraŭ estas facile havebla? Alivorte: Ĉu eble nia ĉiujara, multe glorigita festo de l' libro pli similas al FASTO de l' libro?

Kompreneble ne sufiĉas nur pripensi la kvantojn. Ĉu povas do kulpi tro malalta kvalito? Certe

INTERNACIA ORGANIZA KOMITATO

Prezidanto :

Prof. D-ro G. Canuto,

Profesoro en la Universitato de Torino, estinta
Rektoro de la Universitato en Parma, Gr. Uff. de
la Itala Respubliko.

Sekretario :

Prof. D-ro I. Lapenna,

Estinta profesoro en la Universitato de Zagreb,
"Fellow" en la Londona Altlernejo de Ekonomia
kaj Politika Scienco de la Universitato en London.

Vicprezidantoj :

Prof. D-ro Eŭgeno Bokarev, Univ. profesoro, lingvisto (Soveta Unio);
Prof. D-ro Björn Collinder, Univ. profesoro, lingvisto (Svedlando);
Prof. D-ro W. E. Collinson, Univ. profesoro, lingvisto (Britujo);
Prof. D-ro Carlos Domingues, Univ. profesoro (Brazilo);
Inĝ. Edmund Fethke (Pollando);
Prof. D-ro José Font y Puig, Univ. profesoro, lingvisto-latinisto (Hispanujo);
Inĝ. J. R. G. Isbrucker, docento en Alta Teknika Lernejo (Nederlando);
John L. Lewine (Usono);
Prof. D-ro E. Privat, Univ. profesoro, lingvisto (Svislando);
Prof. D-ro Hideo Yagi, Univ. profesoro (Japanujo).

Helpa Sekretario :

Norman R. Smith, B.Sc. (Britujo).

Membroj :

D-ro fil. C. J. Adcock (Novzelando), *José Antunes* (Portugalujo), *D-ro Inĝ. G. Azzi* (Italujo), *Generalo L. Bastien* (Francujo), *Hans Bauer* (Aŭstrujo), *Paroĥestro Alfons Beckers* (Belgujo), *Univ. prof. Fŭjio Egami* (Japanujo), *Prof. M. Fernández-Menéndez* (Urugvajo), *Advokato Rafaelo Gastón*, *Membro de la Belarta Akademio* (Hispanujo), *Ralph Harry* diplomato (Aŭstralio), *D-ro Rama Hegde* (Hindujo), *D-ro W. Herrmann* (Germanujo), *H. W. Holmes*, O.B.E. (Britujo), *H. A. de Hoog* (Nederlando), *S. Hujucz* (Ĉinujo), *M. Jaumotte*, industriisto (Belgujo), *David W. M. Jenkins* (Kanado), *D-ro Jaromir Jermář* (Ĉeĥoslovakio), *Hasan Kocaman* (Turkujo), *Hans Kürsteiner* (Svislando), *Marton Lajos* (Hungarujo), *Maurice Lewin* (Britujo), *R. Llech-Walter* (Francujo), *Privat-docento D-ro P. Neergaard* (Danlando), *Univ. Prof. D-ro Seiho Nishi* (Japanujo), *Philip Ogwuazor* (Nigerio), *Violin Oljanov*, ĵurnalisto (Bulgarujo), *Univ. Prof. D-ro Juan de Oyarzabal* (Meksikio), *Pierre Paulus* (Kongo Belga), *D-ro Erlino Salzano* (Brazilo), *Inĝ. Hektor Sánchez-Latour* (Gvatemalo), *Univ. Prof. D-ro Mikaelo Sancho Izquierdo* (Hispanujo), *D-ro Iorge Sato* (Argentino), *J. Selbekk* (Norvegujo), *Mag. Vilho Setälä* (Finnlando), *Univ. lektoro L. Sinha* (Hindujo), *Univ. prof. D-ro Hugo Sirk* (Aŭstrujo), *Kort. Konsilisto Hugo Steiner* (Aŭstrujo), *Jan Strönne* (Svedujo), *Cejlona Sanghana Njanasatta Thero*, *Budhana ĉefmonaĥo* (Cejlono), *Charles Thollet* (Maroko), *Rangkajo Ch. Sj. Datoe Toemenggoeng*, verkistino (Indonezio), *E. W. Woodruff* (Sudafriko), *Inĝ. Ludvik Zaleski-Zamenhof* (Pollando), *Peter Zlatnar* (Jugoslavio), *Inĝ. Mohamed Youssef* (Unuigita Araba Respubliko).

ne. Ĝuste se oni traktas ankaŭ la kvaliton, la skizita situacio aspektas eĉ pli kritika, ĉar neniu serioza observanto povas nei, ke ĝenerale la kvalito de la esp-libroj estas multe pli alta ol en la tempo de la Danciga kongreso. Precipe nun elstaras la originala verkado.

Kio aŭ kiu do kulpas?

Oni foje parolas pri krizo kultura, kaj tute prave estas, ke ni vivas en epoko de kreskanta pasiveco rilate la kulturan alpropriigon: Filmo, radio, kaj ĉefe tele-

vizio preskaŭ ekskluzive flegas pasivan distron.

Sed kulturo, kiu nur distras, apenaŭ estas kulturo. Tial libroj ĉiam ludis, ludos kultur-aktivigan rolon. Gloron al la presarto, sed pli al la legantoj!

Ne elĉerpiĝis la optimismo ĉe niaj eldonistoj, eĉ se kelkaj baraktas sendube dum generacioj disvendante unu solan verkon. Tamen ekzemple eldonejo Stafeto dum 6 jaroj aperigis 12 verkojn. Ĝi preparas por la Zamenhof-jaro eksterordinarajn fortostreĉojn,

konsciente, ke ĉiu nova valora libro estos monumento certe ne malpli efemera ol la multaj aliaj aktivecoj omaĝe al la kreinto de Esperanto.

Sen literaturo nek lingvo nek movado! Ni ne perdiĝu en tradici-kontenta glorigo de unu sola tago de l'libro, nek nia konscienco trankviliĝu aĉetante unu solan libron ĉiun 15an de decembro. Multe pli konkrete:

En ĉiu MONATO estu minimume unu tago de l'Esperanto-libro!

Poul Thorsen

INSTRUISTOJ ATENTU

Okaze de la naskiĝtago de D-ro Zamenhof, la 15-an de decembro, ĉiu profesia instruisto-

esperantisto dediĉu en sia klaso lecionon por informado pri Esperanto kaj ĝia kreinto.

Parolado de s-ro René Llech-Walter, Estrarano de U.E.A.

en Mainz, okaze de la Jubileo de U.E.A.
la 5-an de Aŭgusto 1958

Karaj Gesamideanoj,

En niaj landoj, kiam la ŝtato bezonas monon, oni kreas novajn impostojn, laŭ la propono de la Financa Ministro.

Kiel Financa Ministro de U.E.A. mi tre dezirus krei ankaŭ novajn impostojn, por plenigi la kason de U.E.A., sed U.E.A. ne havas la rajton levi novajn impostojn. Do, kiel fari?

Estas nur unu solvo, alvoki vin, por pligrandigi la membraron de U.E.A.

En la jaro 1954, ni estis 17.000.

En la jaro 1955, ni estis 22.000.

En la jaro 1956, ni estis 25.000.

En la jaro 1957, ni estis 28.000.

Varbante membrojn por U.E.A., vi faros du gravajn servojn:

Unue : Vi plenigos la kason de U.E.A., kaj, kredu min, tio estas urĝa kaj necesa;

Due : Por nia propagando estus granda efiko paroli pri cent mil membroj, anstataŭ dudek-ok mil, ĉar la oficialaj instancoj de niaj landoj aŭdas paroli pri milionoj da esperantistoj en la mondo, sed ili nur vidas la oficialajn ciferojn de la membraro, ĉar, por ili, nur valoras la oficialaj dokumentoj, kaj ne la fanfaronadoj.

Kaj, kion faras U.E.A.?

U.E.A. eldonas monatan revuon kaj jarlibron.

- havas 2.539 Delegitojn en 62 landoj.
- funkciigas Internacian Gazetaran Servon.
- organizas la Universalajn Kongresojn.
- iniciatis la Internacian Someran Universitaton.
- stimulas la literaturon per Belartaj Konkursoj.
- kreis la Centron de Esploro kaj Dokumentado.
- ebligis reprezentigon en Montevideo.
- aranĝis la Universalan Ekspozicion.
- okazigas Agadon en Proksima Oriento.

U.E.A. ne estas la Estraro.

U.E.A. ne estas la Komitato.

U.E.A. estas ni, ĉiuj membroj de la granda Zamenhofa Familio.

Kaj mi petas la Prezidantojn de lokaj Grupoj ke ili bonvolu zorgi pri la aliĝo de ĉiuj membroj al U.E.A.

— Kaj mi tre forte konsilas al ĉiuj profesoroj aliĝigi la lernantojn al U.E.A.

En kelkaj urboj, ĉe la komenco de la kursoj, sumeto estas petata de la gelernantoj. Vi scias ke, kiam oni pagas ion, tio valorigas la aferon. Do, ne forgesu kalkuli en la sumeto, almenaŭ la aliĝon

kiel simpla Asocia Membro al U.E.A., kaj paroli pri la agado de U.E.A.

En la kongresejo, estas budo de U.E.A. Vizitu ĝin.

Se vi ne estas ankoraŭ membro de nia Asocio, tuj aliĝu.

Ĉu vere, ĉiuj esperantistoj ne devus ricevi la Jarlibron? almenaŭ la Jarlibron ĉar tiu ŝatinda libreto pruvas al la mondo ke Esperanto vivas per la servoj de la Delegitoj sur la tuta tero.

Do, ne atendu pli longe. Via devo estas aliĝi al U.E.A.

Se ĉiuj niaj fortoj kolektiĝas en unu sola grandega Universala Asocio, laŭ la devizo "Unueco estas Forto", tiam ni alvenos sur favoran grundon por la enkonduko de Esperanto en la lernejojn.

Tiam, ni alvenos al nia dua devizo, al la fina celo.

René Llech-Walter
Estrarano pri Financoj

Komuniko pri la Internacia Patrona Komitato

Laŭ la decido de la IOK por la Zamenhof-Jaro, en tiu ĉi numero de nia revuo estis publikigota la kompleta listo de la membroj de la Internacia Patrona Komitato. Bedaŭrinde pluraj landaj asocioj kaj reprezentantoj en regionoj sen landa asocio ankoraŭ ne informis la sekretarion de la IOK pri la personoj, kiuj akceptis eniri en la IPK. Ĉar pro diversaj kaŭzoj estus absolute neoportune publikigi nur nekompletan liston, estas decidite prokrasti la publikigon ĝis januaro 1959.

La landaj asocioj kaj la kunlaborantoj estas petataj ne publikigi la Deklaracion kaj eventuale aliajn dokumentojn antaŭ ol ili ricevos de la sekretario la kompletan liston kun la nomoj de ĉiuj membroj de la Internacia Patrona Komitato kaj kelkajn konsilojn kiel agi. Estas necese, ke la tuta agado estu kiel eble plej harmoniigita en la tuta mondo.

Sekretario de IOK

SinJORINO Madeleine Haudebine al Hindujo

En la servo de Esperanto

La Komitato de U.E.A. en Mainz serioze studis la demandon kiel firmigi kaj vastigi la unuajn signojn de Esperanto-Movado en Hindujo, kiuj ekĝermis en tiu lando post la modela laboro de Lic. Tibor Sekelj kaj lia helpintino F-ino Elsie Parson.

Necesegaj estas 1-2 Esperanto-instruistoj dum minimume du jaroj, por ke la Movado povu kreski en tiu vastega lando. Tiel decidis la Komitato en Mainz. Sed, nur 1000.- gld. da subvencio U.E.A. povos disponigi al tiu, kiu volas preni sur sin tiun grandan taskon.

Tamen, entreprenema kuraĝulino, Madeleine Haudebine, estas preta dediĉi kelkajn jarojn de sia vivo al tiu grandioza laboro.

Kiu kaj kio estas tiu malgranda energia virino, kiu silente kaj modeste vivas sian vivon per kaj por Esperanto jam de pli ol 25 jaroj?

Ŝi estas parizanino. En 1932 ŝi eklernis Esperanton. En la sama jaro ŝi estis help-sekretariino de la 24-a Universala Kongreso en Parizo. Ŝi kontaktis Julio Baghy, kiu gvidis Cseh-kursojn, kaj ankaŭ la nederlandan Cseh-instruiston Sipke Stuit. En 1933 ŝi partoprenis la Cseh-seminaron en la fama Esperanto-Domo en Arnhem, gvidatan de Andreo Cseh mem.

Tio jam estis decida por ŝia vivo. Ŝi lasis sian bonan memstaran okupon kaj por ĉiam dediĉis sin al instruado de la Internacia Lingvo. Ŝi instruis du jarojn en Sorbonne en Parizo, poste en norda Nederlando, plurajn jarojn en Svedujo kaj ĝuste antaŭ la milito en Belgujo. Kun sia granda natura talento por instruado, sia vigleco kaj spri-teco, ŝi evoluis en kelkaj jaroj al unu el la plej bonaj Cseh-metodaj instruistoj. Ŝi havas la kapablon rakonti la spritaĵojn de la kurso, kiujn ŝi rakontis eble jam milfoje, tiel vigle kaj freŝe kvazaŭ ŝi mem ĵus elpensis ilin.

Post malfacila kaŝita vivo de fuĝinto dum la milito kaj konsekvenca longdaŭra malsano, ŝi reprenis post la milito la instruadon dum kvar

vintroj en Norvegujo kaj kvin sinsekvaj en Danlando.

La vivo de homo, kiu perlaboras nur per Esperanto-kursoj kaj kelkaj hazardaj lecionoj de franca lingvo, estas malfacila. Dumvintre la enspezoj estas tre modestaj, dumsomere ili tute ĉesas. Nur homo kun minimumaj personaj postuloj,

preta rezigni pri tre multe, sukcesas elteni tion. Kun admirinda optimismo SinJORINO Haudebine ne nur brile eltenis ĝis nun en al ŝi konataj landoj okcidentaj, sed ŝi ankaŭ kuraĝe decidis plue elteni en absolute nekonata orienta lando, kie sendube atendas ŝin plej diversaj novaj problemoj.

La rakonto pri tiu ĉi vivo de servado al la Movado trudas la demandon, kion do donas Esperanto al la homo,

kio valoras tiom da malegoismo. SinJORINO Haudebine donas la respondon:

"Mi neniam lernis alian nacian lingvon ol la francan, ne pro manko de intereso, sed pro manko de eblecoj. Esperanto malfermis al mi la mondon. Mense kaj kore ĝi ŝanĝis miajn konceptojn pri la mondo kaj la homoj."

Madeleine Haudebine ne estas homo, al kiu oni faros monumenton. Sed alta monumento por ŝi troviĝas en la koroj de sennombraj kursanoj kaj amikoj en preskaŭ ĉiuj landoj en Eŭropo. Sendube baldaŭ ankaŭ en Hindujo!

De tiu ĉi loko U.E.A. deziras ankoraŭfoje tutkore danki al tiu ĉi modela esperantistino pro ŝia preteco akcepti gravan mision en Hindujo, malgraŭ la minimuma materia helpo, kiun povas doni al ŝi la Asocio. Ni volonte apelacias al ĉiuj legantoj, kiuj volas materie helpi al la Agado Proksima Oriento ĝenerale, turni sin al la oficejo de U.E.A. aŭ al la konataj adresoj de la naciaj perantoj.

La 14-an de novembro 1958 ŝipo el la brita haveno Southampton portis nian simpatian instruistinon al Bombay. Niaj plej bonaj pensoj kaj varmaj bondeziroj akompanas ŝin.

Marianne Vermaas



Dekjara datreveno de la Universala Deklaracio de la Homaj Rajtoj

La Unuiĝintaj Nacioj decidis soleni la dekan datrevenon de la Universala Deklaracio de la Homaj Rajtoj, akceptita de la Ĝenerala Asembleo en Parizo la 10-an de decembro 1948. La solenaĵojn organizas speciala komitato de Unuiĝintaj Nacioj en kunlaboro ankaŭ kun UNESKO. Al ĉiuj registaroj kaj al privataj organizaĵoj, kunlaborantaj kun U.N. aŭ UNESKO, estas sendita invito partopreni en la memorigaj ceremonioj.

UEA estis en daŭra kontakto kun UNESKO kaj kun la Komisiono de U.N. UEA sendis al ambaŭ organizaĵoj siajn sugestojn kaj pluraj estis akceptitaj en la ĝenerala programo. Aliflanke UEA informis pri la afero la landajn asociojn jam en majo de tiu ĉi jaro kaj sugestis, ke ili memorigu la 10-an de decembro aŭ iun tagon proksiman al la 10-a la U.D. de la Homaj Rajtoj; plue, ke ili instigu la lokajn grupojn festi tiun tagon ĉu en kunlaboro kun neesperantista komitato de la koncerna urbo por la festo, ĉu, se tia ne ekzistas, memstare. Estis ankaŭ sugestite, ke la fakaj kaj specialaj organizaĵoj dediĉu almenaŭ mallongan artikoleton al la Universala Deklaracio en la decembra numero de siaj organoj. La Esperantaj fakoj de la Radio-stacioj estis petitaj memorigi la tagon per prelegeto kaj la redaktoroj de la Esperanto-gazetoj per almenaŭ mallonga artikoleto.

Ĉiuj Esperanto-organizaĵoj, kiuj organizos ian aranĝon okaze de la datreveno, estas memorigataj nepre sendi telegramon aŭ leteron de solidareco al Unuiĝintaj Nacioj, New York kaj U.N.E.S.C.O., Place de Fontenoy, Paris, 7e, Francujo.

Estas superflue emfazi la etikan, politikan kaj eĉ juran gravecon de la Universala Deklaracio por la homaro kaj por ĉiu unuopa individuo. Specialan signifon ĝi havas por la Esperanto-Movado, kies celo estas enkonduki komunan neŭtralan lingvon en ĉiujn internaciajn rilatojn kaj tiamaniere ne nur forigi la lingvan diskriminacion, sed ankaŭ per tio kontribui al pli realeca esprimiĝo de la rekonitaj homaj rajtoj kaj liberecoj. Tial ankaŭ la Statuto de Universala Esperanto-Asocio deklaras, "ke la respekto de la homrajtoj estas por ĝia laboro esenca kondiĉo".

Post multaj kaj longaj diskutoj en pli ol 100 kunsidoj de la Komisiono pri la Homaj Rajtoj,

formita de Unuiĝintaj Nacioj, la Universala Deklaracio estis fine akceptita per 40 voĉoj favore, neniuj kontraŭ kaj 8 sindetenoj.

Ellaborita sub la influo de aspiroj komunaj al la tuta homaro kaj fiksita de la reprezentantoj de ĉiuj nacioj, la Deklaracio prave meritas esti nomata "universala". Ĝi estas universala ankaŭ tial, ĉar ĝi ne estas esprimo de tiu aŭ alia nacia, doktrina aŭ religia koncepto. Iusence ĝi prezentas kompromison, sed pozitivan kompromison, kiu akceptas maksimumon akcepteblan kiel komune homan, super ĉiuj diferencoj de politikaj sistemoj, filozofiaj mondrigardoj kaj religioj. Fine, la Deklaracio estas universala, ĉar ĝi rilatas al ĉiuj homoj, al ĉiuj regnoj kaj teritorioj, tute senkonsidere al ilia politika reĝimo.

La fundamentoj de la Universala Deklaracio troviĝas en ĝiaj artikoloj 1 kaj 2 : libereco, egaleco, frateco kaj malpermeso de diskriminacio.

Tiuj principoj estas pli detale fiksitaj en la aliaj artikoloj. La unua principo rilatas al liberecoj de persona karaktero, inkluzive la rajton je vivo kaj sekureco (art. 3-11), la alia koncernas la rajton de la individuo en liaj rilatoj kun la aliaj personoj aŭ objektoj de la ekstera mondo : geedzeco, ŝtataneco, nacieco, proprieto kaj simile (art. 12-17). Du pliaj rilatas al la politikaj rajtoj kaj liberecoj, unuflanke, kaj al paralelaj ekonomiaj, sociaj kaj kulturaj rajtoj aliflanke (art. 18-27). La lastaj du artikoloj proklamas la devojn de la individuo al la socio.

Sendube, en multaj partoj de la mondo ekzistas granda malharmonio inter la solene proklamitaj rajtoj kaj liberecoj de la Universala Deklaracio unuflanke, kaj ilia realigo en la praktiko aliflanke. Tiu bedaŭrinda kaj kondamninda stato neniel pravigas la opinion, ke la Universala Deklaracio estas senvalora. Tute male, ĝi havas grandegan moralan kaj ankaŭ juran valoron, sed tiu valoro dependas de la efektivaj fortoj, kiuj troviĝas malantaŭ la Universala Deklaracio kaj de la energio, per kiu ili postulos, ke ĝiaj principoj estu respektataj. La Universala Deklaracio estas forta armilo en la manoj de tiuj kiuj luktas por homeco kaj justeco.

I. L.

Promenado tra Varsovio

La urbo, kie vivis Zamenhof

Mi iras rapide en malgranda strateto de l'Malnova Urbo. La strato mallarĝa, enpremita en la vicon de la muraj domoj. Malofte kaj mallonge mi rigardas la vendejajn fenestrojn, ne estas tempo, mi devas rapidi. Subite ekfrapas mian atenton malgranda areto da homoj rigardantaj supren. Ekskursanoj, sendube, ĉar en la mezo staras homo maldika kun okulvitroj kaj ankaŭ rigardas supren, ion montras, klarigas. Mi levas la okulojn, rigardas kien li montras. Mi vidas nun, ke mi staras antaŭ la varsovia katedralo, kiu antaŭ nelonge estis ruinaĵo el ŝtonoj kaj brikoj, nun restarigita en la sama loko kiel antaŭ multaj jaroj. Malrapide mi sekvas la ekskursanojn al Malnova Urba Placo. Preskaŭ neremarkeble Varsovio ĉesas esti por mi la urbo de vendejoj kaj kioskoj kun ĵurnaloj, de vespere tiel plenaj stratoj, de kinejoj kaj kafejoj, oficejoj kaj hoteloj. Varsovio fariĝas peceto de historio. Ĝiaj domegoj kaj muzeoj, preĝejoj, teatroj kaj stacidomoj, ĝiaj pontoj super la grizaj ondoj de Vistulo, la parkoj, malnovaj palacetoj — ĉio rakontas la historion de multaj jaroj, de multaj generacioj.

Varsovio estas urbo freŝe konstruita sur la kampo de ŝtonoj kaj ruinoj, kiujn postlasis la milito, ĝi estas ankaŭ la urbo de l'historio, kiu ĉiupaŝe lasis la memoraĵon de la pasinteco. Tie ĉi kreis neforgeseblajn verkojn grandaj poetoj, tie ĉi en kvietaj stratetoj kaj belaj anguloj naskiĝis "artista spirito" de famaj pentristoj. Ĝis hodiaŭ la urbo estas prikantata en multaj poemoj, ĉiutage



en mallarĝaj stratoj de l'Malnova Urbo, tiu Montmartre de Varsovio, vi povas renkonti pentristojn kaj ĉiuspecajn artistojn-strangulojn, kiuj rigardas kaj rigardas kaj serĉas en tiuj muroj kaj stratetoj siajn malnovajn rememorojn kaj novan belecon.

La verkisto Paweł Hertz en siaj rememoroj pri Varsovio skribis jene: "La granda urbo ne estas sole iu komplekso de domegoj, stratoj, placoj kaj pontoj. La granda urbo — kaj fakte ĉiu urbo — kiu havas sian propran historion, estas antaŭ ĉio amaso da pensoj kaj sentoj, rememoroj kaj agoj de la homoj, kiuj en ĝi loĝis kaj loĝas". La verkisto rememorigas, ke en la strato Elektoralna kaj poste en la Palaco de Paco ĉe Miodova strato loĝis granda poeto pola Julius Słowacki, kaj en Palaco de Zamojski ĉe Żabia kaj Placo Bankowy vivis Antoni Edward Odyniec — amiko de la poeto Adam Mickiewicz. Tie promenadis Prus — aŭtoro de "Lalka" kaj "Faraono", tie — Mochnacki kaj Lelewel, tiun scenon rememorigas al ni la desegnaĵo de Grottger, la alian — la verkisto Kraszewski en sia "Infano de l'Malnova Urbo", tiun — Gojawiczynska, la alian — Żeromski. En tiuj ĉi stratoj tondris la artilerio dum la novembra ribelo en pasinta jarcento, kaj en tiu strato antaŭ 14 jaroj oni konstruis barikadojn, jen tiu kastelo reĝa disŝirita de la bomboj aviadilaj. Kiom da historio, kiom da rememoroj....

Sed la ekskursanoj, kiujn mi sekvis al Malnov-urba Placo estas jam iom lacaj. Tiu kaj alia rigardas ankoraŭ la vicon de belaj, puraj domoj

(kaj certe ne povas kredi, ke antaŭ dek jaroj estis tie ĉi grizaj ruinoj). Iu modeste proponas eniri la vinejon de Fukier kaj trinki iun glaseton da vino. Iu juna fraŭlino volas "ensalti" rapide en apudan elegantan magazenon. Jes, ili ne estas "varsoviaj infanoj" por kiuj tiu kvartalo kaj aliaj partoj de la ĉefurbo estas kunigitaj kun rememoroj de personaj travivaĵoj, per kiuj la historio de Varsovio estas parteto de ilia propra vivo.

Mi forlasas do la ekskursanojn, la Malnov-urban Placon, mallargajn stratetojn, la katedralon, la ruinojn de la reĝa kastelo. Mi rigardas por momento de balustrado malsupren al la vico de aŭtomobiloj, tramoj, aŭtobusoj, kiu rapidegas al la ponto Slaski, mi kaptas per la okulo la belan kvartalon Marienŝtadt kaj post kelkaj minutoj mi jam rapidas en aŭtobuso tra la novkonstruita post la milito strato Krakowskie Przedmieście. La monumento de Mickiewicz, la historia "Dziekanka", barokaj preĝejoj, amasiĝintaj en tiu strato, malnovaj, tradiciaj hoteloj... Jen universitata pordego kaj en profundo videblaj la fama Biblioteko kaj multaj domegoj kunigitaj kun la nomoj de famaj homoj, kiuj studis ĉi tie, domoj konstruitaj ĉe komenco de la 19-a jarcento! La unueco de io nova kaj malnova pasinteco kaj moderno estas tiuj domoj historiaj en la strato kaj la novaj vendejoj kaj kafejoj. Nian vojon tranĉas la Aleo Jerozolimskie, ĉe kiu staras la Centra Magazeno Universala, la Centra kaj la Mezurba stacidomoj, kaj kiu ligas per Poniatowski ponto tiun Varsovion kun la alia, alispeca kvartalo.



Ni rapidas tra Nowy Swiat kaj jen ni jam glitas sur la asfalto de Aleo Ujazdowskie — Les Champs Elisée de Varsovio, plena de arboj kaj parkoj. La ĝardenoj Ujazdowski kaj Botanika, la parko Łazienki, kie troviĝis la rezidejo de la lasta pola reĝo Stanisław kun bela palaco apud akvo, palmejo kaj centjaraj arboj, havas nun multkoloran, aŭtunan vestaĵon kaj invitas al promeno aŭ restado. Same kiel la domoj de Varsovio, ĝiaj parkoj estas plenaj de historio kaj rememoroj.

Mi forlasas la aŭtobuson en la Placo de l'Unio, ronda, kiel pariza Placo de l'Stelo nur multe pli malgranda, kie finiĝas kelkaj stratoj, kaj mi daŭrigas la promenadon tra la Marszałkowska strato moderna, centra loĝkvartalo. Tio ĉi estas jam nova, Placon Zbawiciela kun malnova preĝejo, la tute novan Placon de Konstitucio, kie troviĝas la moderna, centra loĝkvartalo. Tio ĉi estas jam nova, moderna Varsovio kun hoteloj, vojaĝ- kaj aviadiloficejoj, grandaj magazenoj, restoracioj. Vespere ekbrilos ĉi tie la neolumoj, kaj homoj alvenos promenadi, pleniĝos la vendejoj, kafejoj. Proksime leviĝas super la domegoj 40-etaĝa Palaco de Scienco kaj Kulturo kun sidejo de la Pola Scienca Akademio. Jes, tio estas jam Varsovio moderna, Varsovio hodiaŭa. La historio memorigita sur la paĝoj de libroj kaj pentraĵoj kaj la vivoplena hodiaŭa tago estas kunigitaj en tiu urbo kiu jam 300 jarojn estas nia ĉefurbo.

Mi eniras la librejon por aĉeti iun libron pri la urbo. Mi volas ekkoni pli bone Varsovion. Mi estas surprizita: jen mi vidas amason da libroj dediĉitaj al Varsovio: rememoroj, taglibroj, poezio... "Mia Varsovio", "Varsovio de mia infaneco" ktp. Poetoj, verkistoj, pentristoj, aktoroj, kiuj travivis ĉi tie la infanajn kaj junecajn jarojn, kiuj fariĝis maljunuloj ĉi tie, priskribas Varsovion. Varsovio—urbo nevenkita, diris pri ĝi "Varsovia popolo", tiu specifa tipo de homoj kun sia propra folkloro, vivmaniero kaj lingvo. Urbo neforgesebla — oni diras nun pri Varsovio, ĉar vere ĝi estas de multaj jaroj prikantata de poetoj, ĝi vivas en pentraĵoj de la majstroj kaj en rememoroj de artistoj kaj simplaj homoj.

Sed.... estas jam tempo reveni hejmen. Vesperiga.... "Varsovia vesperiĝo" — kiel oni kantas en iu kanteto pri Varsovio (ho, kiom da tiuj kantetoj kaj kantoj ekzistas pri nia urbo, neniuj povas kalkuli!) Morgaŭ mi denove iros promeni tra la stratoj de l'urbo. Kune kun la areto da aliaj homoj, "varsoviaj popolanoj".

Tia estas jam tiu varsovia popolo: ĝi ŝatas trapasi la tempon tiamaniere, promeni, vagadi tra la stratoj, aĉeti librojn pri Varsovio kaj rememori "la vivon de la urbo", tiun vivon, kiu — kiel diras P. Hertz — estas tiel rimarkinda, nekutima kaj samtempe tiel homa, kaj denove, ĉiam denove ekkoni sian urbon, sian Varsovion.

Jadwiga Rydygier

Varsovio, 8.10.58

Esperantismaj Problemoj

Post kelkara interrompo ni ree aperigas de tempo al tempo studojn pri la problemoj de nia movado kun la celo informi la esperantistan publikon pri problemoj solvindaj kaj solvendaj kaj eventuale trovi kunlaborantojn por realigi ion, kie tio necesas.

Konstanta enciklopedio de la Internacia lingvo

Nenio ilustras pli okulvideble la amplekson de nia movado ol la bezono disponi en konvena momento, fidindan informon pri persono, okazintaĵo, verko kiu interesas nin. Malmultaj estas tiuj, kiuj memoras faktojn el proksima tempo kaj okazintaĵo de antaŭ jardekoj paliĝas kaj forgesiĝas en la detaloj. Ekzistas efektive kelkaj specialistoj, bibliotekistoj ekzemple, kiuj kun amo kaj pasio kunigis dokumentojn, precipe librojn. Ni citu Montagu C. Butler, la bibliotekiston de la Brita Esperanto-Asocio, la Esperanto-Muzeon, kreitan de Kortega Konsilisto Hugo Steiner en Vieno, la bibliotekon de UEA. Sed tio estas materialo muzea, ne facile konsultebla kaj ne prilaborata laŭ dokumentiga vidpunkto. Laŭdinda eksperimento plenumi truon en nia konsulta-dokumenta literaturo estas la **"Enciklopedio de Esperanto"**, iniciatita de Ivan Grenadieviĉ Ŝirjaev, ortodoksa pastro en Vologda gubernio. Esperantisto de 1895 tiu-ĉi fervorulo kolektis metode pli ol dumil artikoletojn pri ĉio interesa en la movado, laŭ alfabeto ordo. Ĝi formis la kernon de la citita Enciklopedio duvoluma kun 600 paĝoj da teksto, plie kelkcentoj da bildpaĝoj, formato praktika, 22 × 15 cm. Finredaktis kaj aranĝis la verkon samideanoj Kökeny, Bleier kaj D-ro Kalocsay, ĉiuj en Budapeŝto, la trian volumon kompilis la verkinto de nuna artikolo. Ĝi devis aperi en jaro 1935, presata en Japanujo (ero de impona projekto de Vilmos Bleier en Budapeŝto). La politika tensio ekreginta en la jaro 1933 kaj sekvantaj, nuligis la planon de Vilmos Bleier. La materialo sendita de la redaktoro de la tria volumo, pli ol mil artikoletoj, ĉiu sur duono de leterfolio, zorge skribita kaj kontrolita pereis. Feliĉe ekzistas kopio en Genève, kompletigata de tempo al tempo.

Ne estas eble aperi ree tian Enciklopedion. La ideo de Vilmos Bleier estis jena: Presigi en lando kun ebleco aperi librojn je preskosto malalta, sed presado plej bona. Tio estis la fakto en Japanujo. Japanaj libroj estas bonkvalitaj, zorgeme kompostitaj, agrable prezentitaj. La tre malalta prezo (tiutempe) estus ebliginta disvendi gravan parton de la libro en Oriento, (oriente en la vasta senco del vorto!) kie eŭropaj libroj kaj ankaŭ la

niaj, ne estas aĉeteblaj por plimulto de niaj samideanoj. La alia parto devis esti vendata en la landoj kun alta vivstandardo, ĝenerale la Okcidento. La verkinto de nuna artikolo priskribis foje tiun ĉi fakton, ke niaj eldonaĵoj estas ne akireblaj por orientanoj kaj proponis ion similan kion celis Vilmos Bleier. Ekzemplo demonstracia: La Esperanto-eldono de la verko *"En okcidento nenio nova"*, aperinta en pli ol 30 lingvoj servis kiel kalkulbazo. La indekso de ĝia prezo estis do 100, la bulgarlingva eldono atingis 28 kaj la japana 23 poentojn. Pli facile komprenebla estas la jena klarigo: Se la eldono en Esperanto kostis 100 la du aliaj estis 28 kaj 23.

Ni reiru al la problemo de la dokumentado esperantista. Ideala situacio estus, se eblus regule noti laŭ praktika maniero ĉiujn okazaĵojn gravajn en la movado, notojn pri manifestacioj, personoj, verkoj aperintaj. Tio estus laboro de pensiulo, libervole laboranta kaj kontentiĝanta je la gratuloj de la Esperantistaro. Nenia sekreto ke por tia laboro profesie farata, ne ekzistas la rimedoj financaj.

Necese estas bone dokumenti. Pri tio ĉiuj konsentas. Eble iam troviĝos bonfaranto, kiu testamente donacos al UEA sumon kiu permesas okupigi personon kompetentan, laborante pri tio kontraŭ modesta kompenso. Ĝis tiam oni ja ne povas atendi. Antaŭ jaroj, Prof. Lapenna, konstante la foreston de fidinda dokumenta materialo, kreis instancon la **Centro de Esploro kaj Dokumentado**. La celo de CED konformas grandparte al tio, kion oni povus nomi **Konstanta Enciklopedio**. Ampleksa laboro estas la traesploro de la Esperantista gazetaro. Aperis en ĝi tre valoraj laboraĵoj, originalaj kaj tradukitaj. La ekzisto de kontrolo sliparo permesus ofte informi kunhelpantojn pri jama ekzisto de io kaj evitus eventuale refari saman laboron.

La bezono informi publikon pri eminentaj personoj en scienco, politiko, ekonomio k.t.p. naskis la konatan verkon "Who is who" t.e. kiu estas kiu? Ion similan ni devus posedi en Esperanto pri niaj aktivuloj — pasintaj kaj nunaj. Kiu riskas eldoni tian verkon meritas nian kunhelpon, kompilan kaj komercan.

Stafeto, la jam bone konata libroeldonejo direktata de Juan Régulo Pérez en La Laguna, Tenerife, Kanariaj Insuloj, prenas sur sin tiun ĉi riskon. La kompiladon kaj redaktadon plenumas la subskribanto, helpata de aro da kompetentaj samideanoj diverslandaj. Invitata kunlabori estas la Esperantistaj organizaĵoj. La verko devos aperi komence de la jaro 1960. Utilajn konsilojn akceptas la redaktoro kun danko. Komence de Oktobro nunjara eliris cirkulero al ĉiuj organizaĵoj, al la UEA komitatanoj kaj al la membroj de la Akademio.

Oktobro 1958.

Hans Jakob

44-A UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO

Varsovio — Pollando

1.-8. aŭgusto 1959

JUBILEA ZAMENHOFA JARO

Sub honora protektado de la Ministro-
Prezidanto de Pola Popola Respubliko
JOZEF CYRANKIEWICZ

Adreso: 44-a Universala Kongreso de
Esperanto, Varsovio.

Telegramoj: Esperanto-Kongreso,
Warszawa.

Banko: Narodowy Bank Polski,
Warszawa, VII O.M. nr. 1531-9-525.

OFICIALA KOMUNIKO

N-ro 2 Novembro 1958

Glumarkoj:

La kvarkolora glumarko de la Uni-
versala Kongreso, kun la arta kon-
gresna emblemo, estas aĉetebla ĉe la
Landaj Asocioj, ĉe U.E.A. aŭ ĉe la
Kongresna Oficejo je prezo de 0,25 us.
dolaroj por folio de 25 pecoj.

Kongresa karto:

Ĉiu kongresano ricevos fine de
decembro la Kongresan Kartan.

Dua bulteno:

La Dua Bulteno, kiu enhavas deta-
lajn informojn pri ekskursoj kaj
loĝado, aperos en februaro kaj estos
sendata al ĉiu aliĝinto.

Hotelaj prezoj:

La nacia turisma entrepreno ORBIS
disponigas al la kongresanoj jenajn
pensionojn en hoteloj:

Kat. A (luksaj) po 10 us. dolaroj por
persono kaj por tago

Kat. B po 7,50 dolaroj por persono kaj
por tago;

Kat. C. po 5,50 dolaroj por persono kaj
por tago.

Universitata domo: ĉ. 20 dolaroj por
la tuta semajno.

La prezoj inkluzivas loĝadon kaj tri
kompletajn manĝojn. La manĝoj povas
okazi en la Kongresejo.

Aŭtomobilistoj:

La kongresanoj, kiuj deziras veturi
al la Universala Kongreso per propra
veturilo estas petataj informi la Lokan
Kongresan Komitaton, por plifaciligi
la necesajn formalizaĵojn, plej malfrue
unu monaton antaŭ sia forveturo.

Karavanoj:

Anoncis karavanon:

— Itala Esperanto-Federacio, Corso
Galileo Galilei 22, Torino

— S-ro S. K. Nielsen, Havepladsvej
129, Fredericia, Danlando

Kongresejo:

Ĉiuj laboroj kaj programoj de la
44-a Universala Kongreso de Esper-
anto okazos en la 36-etaĝa Palaco de
Kulturo kaj Scienco, en la koro de
Varsovio. En ĝi baseno por bano,
restoracioj kaj liberaera teraso kafejo
sub sunŝirmiloj garantios al la kon-
gresanoj agrablajn laborpaŭzojn.

Belarta konkurso:

La juĝkomisiono por la Belarta
Konkurso restarigis en la nuna jaro
la "Enlandan Branĉon". Tradukenda

verkisto estas la pola poeto Leopold
Staff, kiu speciale priantis la urbon
Varsovio.

Jurista kunveno:

La Internacia Asocio de Juristoj
Esperantistaj aranĝos en Varsovio
publikan fakan kunsidon pri "Advo-
kato kaj lia rolo en juĝlaboro".

Universala ekspozicio:

La kvina elmontro de la Universala
Ekspozicio okazos paralele kun la
Universala Kongreso en Palaco de
Kulturo kaj Scienco en Varsovio.

Novaj kotizoj:

Post la 31-a de decembro validos
jenaj novaj kotizoj: Kongresano 7.- us.
dolaroj aŭ egalvaloro; Edz(in)o 3,50 us.
dolaroj aŭ egalvaloro; Junul(in)o ne pli
ol 20-jara kaj studentoj 2,50 us. dolaroj
aŭ egalvaloro.

Individua Membro de U.E.A. ricevas
rabaton de 1 us. dolaro: edzino de
0,50 us. dolaro.

Statistiko (ĝis fino de oktobro):

Argentino 1, Aŭstralio 1, Aŭstrujo 6,
Belgujo 9, Bulgarujo 3, Brazilo 3,
Britujo 24, Danlando 15, Etiopio 1,
Finnlando 3, Francujo 40, Germanujo
40, Hispanujo 5, Islando 2, Italujo 26,
Japanujo 1, Jugoslavio 24, Maroko 1,
Meksiko 1, Monako 5, Nederlando 4,
Norvegujo 3, Novzelando 1, Pollando
72, Svedujo 10, Svisujo 7, Urugvajo 1,
Usono 3. Entute 312 el 28 landoj. (Pa-
sintjare 212 el 25 landoj).

Ekskurso:

Unu el la Kongresaj ekskursoj vizi-
tos Byalistok, naskiĝurbo de D-ro
Zamenhof, okaze de enmasonigo de la
fundamenta ŝtono por la konstruata
monumento al la aŭtoro de Esperanto.

G. C. Fighiera,

Konstanta Kongresa Sekretario

La Internaciaj Konkursoj 1958

Stato je la 31-a de oktobro
Konkurso I

Lando	Kvoto	Poentoj	%
1. Jugoslavio	3800	5680	149.47
2. Brazilo	7011	7785	111.03
3. Pollando	6150	6505	105.77
4. Italujo	4030	3915	97.15
5. Germanujo	6865	6561	95.57
6. Svedujo	6945	6400	92.15
7. Francujo	7647	7011	91.68
8. Nederlando	5567	5089	91.41
9. Britujo	6963	6072	87.20
10. Usono	3225	2720	84.34
11. Danlando	2743	2278	83.05
12. Hispanujo	2508	1989	79.31
13. Svislando	2185	1720	78.71

14. Belgujo	1907	1468	76.98
15. Norvegujo	2144	1601	74.67
16. Finnlando	2765	1915	69.26

Konkurso II

Lando	Kvoto	Poentoj	%
1. Portugalujo	560	615	109.82
2. Aŭstralio	1228	1275	103.82
3. Izraelo	240	240	100.—
4. Kanado	440	430	97.73
5. Sudafriko	235	215	91.49
6. Novzelando	955	868	90.89
7. Japanujo	1280	1150	89.84
8. Aŭstrujo	1505	1345	89.37
9. Islando	315	270	85.71
10. Maroko	659	457	69.35
11. Urugvajo	414	275	66.43
12. Argentino	1005	615	61.19

VOKAS VOĈ' DE VARSOVI': VENU ANKAŬ VI!

Novaj Libroj

Duope ricevatajn verkojn ni recenzas; unuope ricevatajn ni nur mencias.

*) ricevebla ĉe U.E.A.

FOLIOJ EL LA BILDOLIBRO DE DIO de Martinus. La sesa libro en la serio, kiun eldonas Esperanto-sekcio de la Spirit-sciencia Instituto de Martinus. Traduko de C. Graversen. 96 paĝoj, prezo 6,50 d.kr. = 11 int. resp-kup.

Sendube Martinus estas unu el la plej signifaj filozofoj de la nuntempa homaro, disduigita per la materialismo kaj spiritualismo. Liaj verkoj montras lin — homo staranta sur ambaŭ grundoj. Per siaj logiko kaj sentimento kun konscia fidelo li reliefigas efemeron kaj eternon. Ĝuste tial por kompreni liajn librojn ne estas sufiĉe sekvi la logikan ĉenerigon de la frazoj, sed oni devas malfermi larĝe ankaŭ la animon. Lia instruo sieĝas la modernan intelekton, saturitan de materialismaj doktrinoj kaj penadas revigligi por interna vido tiun sesan sentumon, kiu svene vegetas en la samtempuloj. La cinika skeptikulo de nia moderna epoko ofte estas tro oportunema, tro pigra por mediti, eĉ kelkfoje hontas pri tiuj sentoj, kiuj sugestas al li neĉiutagajn pensojn. Nemirinde. La ŝlimo de la korpokulta civilizo degeneras lian kultursoifon, paralizas lian komprenon pri simboloj kaj tial en li nur latentas la konsideremo pri la "leĝo de la reciprokeco".

Martinus pretendas nur aŭskulton, atenton por siaj instruoj kaj neniam blindan akcepton de siaj klarigoj. Li ne volas montri sin moderna profeto kaj ne religifondinto. Li estas inspirita servanto por pionire prepari la vojon al kristaliĝo de nova etiko. Li uzas logikon kaj sentimenton, sciencajn indikojn kaj efektorezultojn, simptomojn kaj fenomenojn, kiuj kune karakterizas la ĥaosan homan vivon kaj mem la homon, baraktantan en tiu ĥaoso. Li fortostreĉe strebas faciligi la surteran pilgrimadon al siaj homfratoj kaj logike montri, pruvi la *racian ligitecon* inter karno kaj spirito.

La verko, ĵus aperinta en Esperanto-eldono, entenas du disertaĵojn: "Folioj el la bildolibro de Dio" kaj "Pentekosta brilo super la Vivo". La unua estas poezia interpretado de simbolriĉaj bildoj troveblaj en la naturo dum sunradia somera tago. Legante mi havis la impreson, ke poeto kaj filozofo konkuris por superi unu la alian. Poezia elokvento kaj konkluda logiko

kolektive klopodas ravi la leganton kaj veki lian sesan sentumon por interna lumo. En la dua disertaĵo la poeto malpli rolas, sed li cedas sian fantazion al la logikema filozofo, kiu brile pritraktas sian tezon. La cinika skeptikulo eble povus ironie kurbigi la lipojn rimarkante: Fantazio kaj logiko estas antipodaj funkcioj. Oni kontrole konstata, ke certagrada logiko troviĝas en la plej aŭdacaj fantaziaĵoj kaj eĉ en la plej rigore seka sciencaĵo trovi estas eble — fantazion. Ĝuste tiu ĉi reciproka influo pruvas, ke la noblacela strebado de Martinus por krei la kunligan volbon super la kolonoj de la materialismo kaj spiritualismo entenas *faktan realaĵon*: la harmonian tuton de la leĝaroj en la Universo.

Mi ŝatas la verkojn de Martinus, ĉar krom la nuancrica esprimmaniero, vekanta en mi artan ĝuon, liaj klare facetitaj pensoj inspire sugestas, ombbron pelas, al optimisma alto levas kaj firmigas min en mia propra kredo pri mia propra idealo: pri la *homa Homo*.

Ĝuste pro la supre menciitaj kaŭzoj mi rekomendas la legadon de ankaŭ ĉi tiu libro de Martinus, kies poezia belo, aninieĝa logiko tre karakterize reliefigas sur ĉiu paĝo dank' al la majstre klara traduko, eleganta lingvaĵo, flua spontaneco, kiuj meritite laŭdas la tradukinton... sed oni ne forgesu, por kompreni kaj plene ĝui la verkon oni larĝe devas malfermi ankaŭ la animon (ofte neatan).

Julio Baghy

La APEROJ DE LA SANKTA VIRGULINO*. — Eldonita de la Fratoj de la Karitato, Stropstrato 127, Gent, Belgujo, 1956. 24 p. 23 × 15 cm. Senpage havebla ĉe la eldonintoj, aldonante, se eble, 1 internacian respondkuponon por poŝtelspezoj.

La Fratoj de la Karitato, Kongregacio fondita en 1807 de la nobla belga Kanoniko Triest kaj havanta 88 branĉojn en multaj landoj dediĉitaj al la karita laboro, estas konata de la esperantistaro pro tio, ke ĝi jam estas eldoninta plurajn propagandilojn en Esperanto konigante la celon kaj agadon de tiu Instituto. Ŝajne kuraĝigitaj de la sukceso atingita inter ni per tiuj presaĵoj, la Fratoj de la Karitato eldonis novan broŝuron, kiun oni recenzas ĉi tie. Kun tre belaj blukolo-

raj desegnoj, ĉi tiu libreto prezentas al la leganto la diversajn aperojn de la Dipatrino en la pasinta kaj nuna jarcentoj, kies kronologia ordo estas jena: Parizo 1830 (La Mirakla Medalo); La Salette 1846 (Nia Sinjorino de La Salette); Lourdes 1858 (Nia Sinjorino de Lourdes); Pellevoisin 1876 (La Virgulino de la Skapulario); Fátima 1917 (Nia Sinjorino de Fátima); Beauraing 1932 (La Kunsavantino) kaj Banneux 1933 (Nia Sinjorino de Banneux). Kvankam la plej konataj aperoj estas tiuj de Lourdes kaj Fátima, katolikaj esperantistoj ankaŭ legos kun intereso pri la aliaj, kies detaloj estas konigataj sufiĉe amplekse en ĉi tiu broŝuro. Ni kore gratulu kaj danku la eldonintojn pro la aperigo de ĉi tiu nova libreto, kiu montras unu fojon pli la favoron, kiun nia lingvo ĝuas en la katolikaj medioj.

J. Juan Forné

NI LEGAS KAJ LERNAS* de Julie Šupichová. Eld. Kroatia Esp.-Servo, 1957. Legolibreto por komencantoj kunmetita el la verkaro de D-ro L. L. Zamenhof. 39 p. broŝ. 14 × 19 cm. Prezo ne-indikita.

Nia nelacigebla ĉeĥoslovaka samideanino denove bone servis la Esperantistaron, farante alireblaj al novaj studentoj de la lingvo plurajn belajn, sed jam ne troveblajn, paĝojn el la plumo de Zamenhof, inkl. multajn proverbojn, unu fabelon de Andersen, eltiraĵojn po unu el *Ifigenio* kaj *Hamleto*, kelkajn el liaj *Lingvaj Respondoj*, kaj liajn plej gravajn pensojn pri la internacilingva demando. Bonŝance, ĉi tiuj pecoj, krom la monologo de Hamleto, ne koincidas kun la enhavo de la *Zamenhofs Legolibro* de Kidosaki. La libro do estas tre utila kontribuaĵo al la grava tasko, konservi la necesan lingvan unuecon, kiun, laŭ la Antaŭparolo, "nur atenta legado kaj studado de la Zamenhofs verkaro kreos".

D. B. Gregor

NI OFERAS* — Eldonita de Katholische Esperanto-Zentrale in Deutschland, Guldeinstrasse 32/IV, München 12, Germanujo, 1957, 3a eldono, 16 p. 16 × 11 cm. Havebla ĉe la eldoninto kontraŭ l' internacia respondkuponon.

Jen tria eldono de broŝureto kun la komunaj preĝoj kaj kantoj dum la Sankta Meso, kompilitaj de Pastro Ludwig Thalmaier, kiu estos tre utila por la katolikaj Esperanto-kunvenoj. La tekstoj estas prenitaj el la preĝlibreto "Al altaro de Dio", de la sama aŭtoro.

J. J. F.

Gratulkartoj por la Festotagoj
Reproduktaĵoj de famaj pentraĵoj
6 duoblaj kartoj kun kovertoj
3 gld.; 12 steloj
Mendu ĉe U.E.A.!

GRAVA PETO AL ĈIUJ

Tre granda nombro de esperantistoj turnas sin ĉiam pli kaj pli kun diversaj proponoj, sugestoj kaj petoj al nekompetenta instanco aŭ estrarano de UEA, kio kaŭzas superfluan korespondadon kaj grandan tempoperdon. Sur la interna kovrilpaĝo de ĉiu numero de nia organo troviĝas la nomoj, adresoj kaj fakoj de ĉiuj estraranoj. Oni bonvolu skribi al tiu estrarano, kiu respondecas pri la koncerna fako, aŭ al la Centra Oficejo, redakcio kaj konstanta kongresa sekretario pri aferoj, kiuj rilatas ilin. Tio multe faciligos la laboron kaj lasos pli da tempo por la plenumo de gravaj kaj urgaj taskoj.

Le ĝenerala sekretario tute aparte petas, ke oni ne sendu al li manuskriptojn por la revuo, protestojn se iu artikolo aŭ artikoleto ne aperis, petojn pri privata korespondado, petojn pri respondo al artikoloj aperintaj eĉ en lingvoj, kiujn li ne konas, petojn pri tralegado de manuskriptoj kelkfoje de 200-300 paĝoj, ĉar tute simple fizike ne estas eble plenumi tiujn petojn.

Speciale nun, en la Zamenhof-Jaro, estas tiom da laboro por kunordigi la agadon kaj plenumi la programon, ke estas ne nur konsilinde, sed eĉ nepre necese centrigi ĉiujn fortojn al tiu granda celo kaj sekve utiligi ĝis maksimumo kaj plej efike la disponeblan tempon.



LA JUNA VIVO

Ĉion por la redakcio de "L. J. V." sendu al :
Philippe Bonnard,
119 Avenue de Choisy, Paris 13, Francujo

4-a Tejo-Skiferio kaj 2-a Tejo-skikonkurso

26-a de decembro ĝis la 4-a de januaro. Prezo : 38 aŭstr. ŝilingoj. Belega internacia skiloko : Filzmoos-Salzburg-Aŭstrio. Informoj kontraŭ internacia respondkupono. Direktu tuj vian aliĝon al :

Heinrich Reiter, Wien X. Sonnwendgasse 32/I/33 Aŭstrio.

JARFINAJ PRIPENSOJ . . .

1958 finiĝas La Esperantista Junulara Organizo estas nun pli forta ! La landoj, kiuj ne havas jam junularan sekcion, estas organizantaj ĝin ; kaj ni povas esti iom fieraj pro la laboro farita de post 2 jaroj. Sed bedaŭrinde staras ankoraŭ pluraj problemoj, kiuj malfaciligas nian laboron !

Ankaŭ en nia organizo, la unua

malforto estas, kiel ĉe multaj organizoj, la financa problemo. La kotizoj estas tre malaltaj, kaj ili ne sufiĉas por viviĝi tian gravan internacian organizon. Ni volas memori al ĉiuj niaj legantoj, ke en statuto de Tutmonda Esperantista Junulara Organizo estas menciita (Art. 15), ke povas esti ĉiu esperantisto Subtenanta Membro. Tiuj membroj havas konsultan voĉon en la Organizo.

La amikoj de la junularo estas ja multnombraj, pri tio ni estas certaj ! Devas kompreni ĉiu Esperantisto, ke la estonteco de la movado estos, post kelkaj jaroj, en la manoj de la nuntempa junularo. Post 20 jaroj kaj pli, la hodiaŭaj gejunuloj devos estri grupojn, landajn sekciojn, ktp Oni scias, ĉu lando estas juna aŭ maljuna laŭ la statistikoj de la naskiĝoj kaj mortoj. Estas same en movado, ĝi povas esti konsiderata kiel juna, nur se estas plimulto da gejunuloj en ĝi.

KIU ESTIS S-RINO BASSOLS ?

La anoncita premio "Comella-Bassols" aktualigas ŝian memorigon. Mortinta antaŭ ok jaroj, ŝi estis la kara edzino de nia konata samideano S-ro Jacint Comella, el Vic (Vik), en la provinco Barcelona. Ŝi plej fervore kunlaboris ĉiam kun sia edzo por nia movado, kaj eĉ gajnis literaturan premion en la Floraj Ludoj de K.E.F. en Manresa (Barcelona) en 1936. Ŝi esperantistiĝis en 1908 kaj ĉeestis kelkajn Universalajn Kongresojn.

La intenco por tiu premio estis komuna de la geedzoj Comella-Bassols, jam antaŭ longe, sed ĝis nun ĝi devis prokrastiĝi pro diversaj cirkonstancoj.

Ni ĝoju pro la nuna fakiĝo, danke al la vidvo S-ro Comella kaj memore al lia forpasinta edzino, S-rino Dolors Bassols de Comella, el la kataluna urbo Vic.

D. D.

KOREKTO

En la antaŭa numero ni publikigis premiitajn kontribuojn por la Belartaj Konkursoj 1958. La redakcio bedaŭras, ke erare elfalis la nomo de la tradukinto de "La Laboranta Reĝo" s-ro Harry Holmes, kiu per sia traduko akiris la 1-an premion en la branĉo Traduka Poezio.

Sed nur junuloj povas sukcesplene propagandi inter aliaj junuloj . . .

Ne estas sufiĉe da vortoj por emfazi la gravecon de nia organizo. Hodiaŭa TEJO estas morgaŭa UEA !

Ĉiuj esperantistoj, kiuj finance povas, devas subteni la Esperantistan junularon. Tiel agante, ili povas esti certaj, ke ili certigas la estontecon de nia Movado.

Alia malforto en nia organizo estas la tro eta reto de junular-delegitoj. La junular-delegitoj estas vere tro malmultnombraj ! En ĉiu granda urbo devus esti almenaŭ unu junulara delegito. Laŭ la unua parto de la Jarlibro 1958, estas nur 24 JD en la tuta mondo ! Ni alvokas ĉiujn gejunulojn, kiuj loĝas en granda urbo kaj kiuj povas akcepti la malgrandan laboron de JD, por ke ili informiĝu pri la ebleco fariĝi junular-delegito de UEA.

Esperantista Vivo

GEEDZIĜO

BECKER-MEISBERGER. La 30-an de oktobro geedziĝis en Blieskastel, Sarlando, f-ino Maria Meisberger kaj S-ro Günther Becker.

STATISTIKO. Jen la stato de la membraro je la fino de oktobro kaj ankaŭ por komparo je la fino de oktobro 1957 :

	1957	1958
Asociaj membroj	15159	18925
Individuaj membroj		
MJ	818	756
MA	5506	4835
MS	678	530
Pat.	5	5
DM	303	307
HM	52	47
JMJ	15	18
JMA	100	115
	7477	6613
	22636	25538

NOVA ĈEFDELEGITO

Allan, J. T., hospital-oficisto, 12 Lonsdale Crescent, Wellington E. 3. Novzelando.

DELEGITOJ :

Brazilo

Fortaleza (Ceará) FD (Religio, adventista) : vakas.

Itanhomi (Minas Gerais) D : vakas.

Santo Amaro (Baia) D : vakas.

Britujo

Huddersfield (Yorkshire) D : vakas.

Wolverhampton (Staffordshire) JD : S-ro John Gobourne, studento, 44, Belmont Road, Penn.

Bulgarujo

Polski Trambeš (Tirnovsko) FD (porpacaj problemoj) : S-ro Ĥristo Manolov, gimnazia profesoro.

Plovdiv VD : S-ro A. T. Šopev, ĵurnalisto, strato "Abaĝijska" No. 16.

Egiptujo

Aleksandrio FD (komerco) vakas.

Ĉeĥoslovakujo

Ústí n/LB D : vakas.

Francujo

Joeuf (Meurthe et Moselle) D : S-ro Roger Degrelle, katolika pastro, Presbytère N. D. de Franchepré. FD (katolikismo) : la D.

Laon (Aisne) JD : S-ro Albert Janson, poŝtisto, 42, Rue Chatelaine.

FD (protestantismo); la JD.

L'Hay-les-Roses (Seine) D : vakas.

Lyon (Rhône) FD (blindulaferoj) : vakas.

Paris VI (Seine) JD : vakas.

FD (studentaj aferoj) : S-ro Paul Ciliga, studento, 17, Rue Duguay-Trouin.

Mont Saint Martin (Meurthe et Moselle) D : vakas.

FD (katolikismo) : vakas.

Germanujo

Beuron (Hohenzollern) FD (katolikismo) : vakas.

Frankfurt a. M. (Hessen) D : vakas.

Hannover (Niedersachsen) FD (inĝenieraj aferoj) : D-ro Inĝ. Wilhelm Groth, ŝtata eksfocisto, Sertünerstr. 8.

Kassel (Hessen) D : vakas.

Kastl (b. Amberg) D-ro József Kondor, gimnazia profesoro por greka-latina, Ungarisches Realgymnasium.

Köln (Nordrhein-Westfalen) FD (turismo) : S-ro Gerhard Vogel, seruristo, Tondern-strasse 36.

Königstein/Ts (Hessen) D : S-ro Wilhelm Kistenbrügger, bankoficisto, Hainerbergweg 10.

● **Prelegvojaĝo de UEA-Komitatano.** Dum la monatoj septembro kaj oktobro la vojaĝanta komitatano de UEA Lic. Tibor Sekelj faris rapidan prelegvojaĝon tra la Skandinaviaj landoj, kie li parolis pri siaj aziaj spertoj dum ĉirkaŭ 20 prelegoj. La gazetaro informis per ampleksaj intervjuoj. Post pluaj prelegoj en Nederlando s-ro Sekelj iris al Parizo, kie li kaj s-ro Thierry estas anstataŭaj reprezentantoj de UEA dum la Konferenco de UNESKO, dum la ĉefreprezentanto prof. Ivo Lapenna ne povos ĉeesti.

● **Belga Katolika laborista gazeto "Raak"** faras siajn komentariojn en franca, flandra, germana, hispana, angla kaj esperanta lingvoj. La esperantan verziojn de ĉiuj tekstoj oni enmetas dank' al la klopodoj de s-ro Willy Wellekens, kaj lia sukceso en tiu cetera konservativa gazeto estas gratulinda.

● **Ankaŭ Kurier Polski** enhavas esperanto-rubrikon, en kiu oni priparolis diversajn temojn. Ekzemple en la numero de la 15.IX.1958 oni priparolas la gazeton "Heroldo", kaj viziton de polaj samideanoj al la Centra Oficejo de UEA.

● **En Danlando okazis someraj espkursoj** ankaŭ ĉijare en Helsingør, kaj ili kiel ĉiam estis aranĝitaj de s-ro L. Friis, Aarhus. Estis 4 diversaj kursoj, kiujn ĉeestis kaj en- kaj eksterlandanoj. Ankaŭ en la aŭtuna ferio s-ro Friis aranĝas kursojn, sed tiam en la Sporta Altlernejo, Vejle. Ĉijare partoprenis eksterordinare multaj eksterlandaj kursanoj, kio promesas bone por la estonteco. S-ro Friis ankaŭ meritas sukceson pro sia ĉiam grandega laboro por la kursoj.

● **Ambasadoro lernas Esperanton.** Inter la novaj studentoj de Esperanto por la Zamenhof-jaro estas la fama cejlona lingvisto Prof. Dr. G. P. Malalasekera, O.B.E., M.A., Ph. D., D. Lit., Profesoro de Pali kaj Budhana Civilizacio en la ŝtata Universitato de Cejlono, eksdekano de la Fakultato de Orientaj Studoj, unua Prezidanto de Universala Federacio de Budhanoj (W.F.D.), ĉefredaktoro de Enciklopedio de Budhismo k.t.p., nun la unua cejlona Ambasadoro en Moskva, Sovetunio. Li tre volonte akceptis esti Patrono de la Internacia Komitato por la festoj de la Zamenhof-Jaro. Por rapide perfektigi en Esperanto, li dankeme akceptos donacojn de lernolibroj kaj sciencaj verkoj pri Esperanto en la angla lingvo je la adreso : His Excellency, Dr. G. P. Malalasekera, Ambassador of Ceylon, Ceylon Embassy, 3rd Ulitsa Meshanskaya 24, Moskvo, USSR.

RADIO

Ĉiujn informojn pri radio sendu al S-ro G. Larglantier, 29 Bd. Murat, PARIS 16, Francujo.

Por tempoj kaj ondlongoj, vidu la oktobran numeron, p. 160.

Radio Roma. 2-XII, Tra la literaturo; 5-XII, Mondfama itala aktorino Eleonora Duse; 9-XII, Novaĵoj el Italujo; 12-XII, Leterkesto kaj bibliografio; 16-XII, Nia mila jubilea disendo; 19-XII, Itala belarta urbo Messina; 23-XII, Itala komponisto Giacomo Puccini; 26-XII, Ĉu pasis Kristnasko?; 30-XII, Italaj kanzonoj en Esperanto; krome, ĉiun merkredon, kuriero de Esperanto.

Radio Zagreb. 4-XII, Divenu !; 11-XII, Zamenhofa festo; la tago de Homaj Rajtoj; 18-XII, La urbo Split; 25-XII, Primovadaĵ novaĵoj kaj respondoj al gekorespondantoj.

Radio Bern. - Radio Wien. Vidu noton en la novembra programo.

Landshut (Bayern) D : S-ro Ludwig Thalmaier, pastro, Spiegelgasse 211. FD (katolikismo) : la D.

Mülheim (Ruhr) D : S-ro Klemens Lamby, kompostisto, Eigene Scholle 7.

Hungarujo

Budapest FD (ministaj aferoj) : vakas.

Italujo

Padova FD (edukado) : S-ro Filippo Franceschi, instruisto kaj studento, vicolo Ortigara No. 7.

Jugoslavio

Sarajevo (Bosna) FD (astronomio) : S-ro Boža Popović, universitata profesoro, Zagrebačka 20a.

Kuwait

Kuwait D : S-ro Nassif Isaac, kontrolisto, P.K. 1483.

Nederlando

Utrecht JD : S-ro Johan Derks, studento, Prof. Reinwardtlaan 11.

Vlaardingen D : S-ro Gerrit Kalkman, magazenadministranto, Schoutenstr 19

Norvegujo

Oslo VD : S-ro Tharald Dybing, komercisto, Dronningens gate 2.

FD (blindulaj aferoj) : vakas.

FD (instruado) : S-ino Marit Delor, instruistino, Oberts Rodes vei 56, Lambertseter.

FD (religio) : S-ro Vidar Vik, studento de teologio, Peder Ankers vei 2, (Ullevold Haveby).

FD (sindikataj aferoj) : vakas.

FD (turismo) : S-ro Jan Ekhaugen, oficisto, Evensgt. 2.

Pollando

Bielsko-Biala (woj. Katowice) D : F-ino Janina Sidorak, aŭtomobilkondukstino, Kamienica 167.

Sovetunio

Moskva FD (kulturaj aferoj) : S-ro I. B. Hoves, ĵurnalisto, ulica Moskva 5 kv. 48.

Svedujo

Malmö (Skane) : VD : S-ro F. T. Lundquist, eksŝipestro, (Amiralsgatan 66A.

Svislando

Arbedo (Ticino) D : S-ro Giovanni Sasselli, lokomotivestro.

FD (fervojojaj aferoj) : la D.

Bellinzona (Ticino) D : S-ro Enea Albertini, lokomotivestro, Villa Danesi, Via Mirasole.

VD : vakas.

FD (fotografarto) : la D.

Giubiasco (Ticino) D : S-ro Kurt Greutert, lokomotivestro, Via Lugano.

Usono

Baltimore (Maryland) FD (elektrotekniko) : vakas.

Dearborn (Mich.) D : vakas.

Hyattsville (Md.) D : S-ro Pault E. Nace, elektra inĝeniero, 1410 Ray Road.

Pacific Palisades (California) D : vakas.

FD (statistiko) : vakas.

Washington (D.C.) FD (elektra tekniko) : S-ro Paul E. Nace, elektra inĝeniero, 1410 Ray Road, Hyattsville, Maryland.

FD (statistiko) : S-ro Thomas A. Goldman, ekonomiisto, 2511 P Street, N.W.

MEMBROJ-SUBTENANTOJ 1958

528 Abreu, S-ro Waldomiro B. de, Pindamonhangaba, Brazilo.

529 Pitta, S-ro Hermes, Salvador, Brazilo.

530 Souza, D-ro João Baptista de Mello e, Rio de Janeiro, Brazilo.

531 Luez, S-ro Daniel, Laon, Francujo.

532 Röhl, D-ro Ludwig, Würzburg, Germanujo.

MEMBROJ SUBTENANTOJ 1959

1 Hehir, S-ro Corn. Patr., Kalgoorlie, Aŭstralio.

2 Llorens, S-ro Robert, Montelimar, Francujo.

3 Bily, S-ro Harry, Berlin, Germanujo.

4 Flores, S-ro Alberto, Duisburg, Germanujo.

5 Helfers, S-ro F., Karlsruhe, Germanujo.

6 Jaehn, S-ro W., Düsseldorf, Germanujo.

7 Masuhr, S-ro Adalbert, Hagen, Germanujo.

8 Pilhofer, S-ro Otto, Nürnberg, Germanujo.

9 Raab, S-ro Johann, Nürnberg, Germanujo.

10 Rosenträger, S-ro Hans, Dortmund, Germanujo.

11 Schönrich, S-ro K., Wiesbaden, Germanujo.

12 Wagner, S-ro Hermann, Fürth, Germanujo.

13 Ramljak, D-ro A., Sarajevo, Jugoslavio.

14 Lapenna, S-ino Emilija, Zagreb, Jugoslavio.

15 Ouwehand, S-ro D., Den Haag, Nederlando.

16 Bijmolt-Ochtman, S-ino C., Amsterdam, Nederlando.

17 Birch-Olsen, S-ino C., Greaker, Norvegujo.

18 Forsberg, S-ro Stig. Otto, Oslo, Norvegujo.

19 Kjonigsen, S-ro Ragner, Sarpsborg, Norvegujo.

20 Resberg, S-ro Thure, Sarpsborg, Norvegujo.

21 Rosbach, S-ro Johan H., Sarpsborg, Norvegujo.

22 Skyberg, S-ro Alfred, Oslo, Norvegujo.

23 Gouveia, S-ro M. M. Lour de, Funchal, Portugalujo.

FONDAĴO ZAMENHOF

Antaŭa sumo 6223.77 gld.

Aŭstria Esperanto Asocio 85.- gld.; S. H. Grant 42.50 gld.; F-ino J. C. Kempson 17.- gld., Aŭstralio; S-ro van Humbeeck 2.05 gld., Reĝa Belga Ligo Esperantista 152.- gld., Bruselo Grupo Esperantista 15.20 gld., Lieĝa Grupo Esperantista 7.60 gld., Grupo "La Verda Stelo" 76.- gld., Lieĝa Grupo Esperantista 7.60 gld., S-ino M. Vandeveld 22.80 gld., A. Laurent 7.60 gld., Belgujo; D-ro Jatyr Goncalver Vieira, 1.20 gld., Brazilo; Ges. J. Brownlee 10.65 gld., F-ino C. Nixon 3.20 gld.; W. H. Higham 106.50 gld., R. Derry

10.65 gld., D. P. Boatman 26.63 gld., Ges. Sly 21.30 gld., B. B. Beaumont 10.65 gld., S-ro Hočjo 1.34 gld., Britujo; H. V. Rasmussen 5.34 gld., Danlando; Ch. Carbonneaux 7.50 gld., F-ino Romanat 7.26 gld., Francujo; A. Masuhr 2.40 gld., Otto Haar 4.52 gld., Otto Bonte 18.10 gld., Horst Michling 18.10 gld., Fr. Trundt 4.48 gld., Germana Esperanta Fervojista Asocio 6.40 gld., Germanujo; Salvador Gumá 2.16 gld., Jozefo Sardá 1.80 gld., Hispanujo; D-ro Urbano Piscini 12.- gld., S-ino Ines Galiardi-Caccialanza 3.- gld., Evandro Maracchia 3.- gld., Prof. Corrado Cerri 2.- gld., Italujo; D-ro Ramljak 2.10 gld., Jugoslavio; C. Pot, 10.- gld., P. Hendriks, 10.- gld., Ned. Esp. Asocio L.E.E.N., 50.- gld., S-ino J. van Geuns 15.- gld., H. Veenstra 25.- gld., S-ino M. C. Geerligs-la Croix 6.- gld., S-ino A. Kan-Pesaro 1.- gld., M. Prins 1.- gld., M. Germeraad 2.50 gld., J. H. Derks 3.75 gld., N.N. en V. 10.- gld., F. Mannheimer 20.- gld., S. S. de Jong Dzn. 7.- gld., F-ino A. Tebbenhof 10.- gld., "Varbadu ankaŭ inter infanoj" 5.- gld., "Kolektu konstante ankaŭ inter neesperantistoj" 5.- gld., Nederlando; John Selbekk 5.32 gld., Lange Madsen 5.32 gld., Ragnv. Harrisland 11.54 gld., Norvegujo; Ges. H. E. Facer 16.38 gld., S-ino G. H. Denniston 10.65 gld., Ges. A. G. Wiltshire 5.33 gld., W. H. King 10.65 gld., E. J. Weber 10.65 gld., Ges. R. J. Clarkson 10.65 gld., F. Woods 5.33 gld., R. S. Wright 10.65 gld., Hastings Esp. Klubo 5.33 gld., Amiko 5.33 gld., C. H. Brown 11.18 gld., A. L. Hartman 10.65 gld., C. L. Purver 53.25 gld., Lincoln Efford 13.05 gld., Novzelando; D-ro C. Anjo 1.84 gld., Portugalujo; S-ino G. Kraft 4.15 gld., Sarlando; Mogens Gröth 23.19 gld., Inĝ. R. Linse 9.75 gld., Ignaz Kueger 3.67 gld., Inĝ. Sven Sjöblom 18.36 gld., Rune Lundgren 18.36 gld., Olof Lindstrom 11.02 gld., E. Malmgren 50.- gld., Esperanto Klubo Höganäs 7.35 gld., Esperanto Klubo Borlänge 36.73 gld., EL-LO 73.46 gld., Svedujo. S-ino Ludmila Brouwer-Scheffer 5.- gld., Turkujo; John Futran 18.87 gld., Harry Hawker 3.80 gld., Usono.

Entute 7630.11 gld. je 1.11.1958.

Donacu unu milonon — aŭ pli ! — de viaj jaraj enspezoj por tiu ĉi gravega celo !

DONACOJ AL LA ĜENERALA KASO

H. Veenstra, Nederlando 1.- gld.; N.N. en V., Nederlando 5.- gld.

DONACO OFICEJA ILARO

N.N. en V., Nederlando 5.- gld.

A.P.O.

P. Williams, Nov Zelando 5.33 gld.; Klubo Esperantista, Oslo 56.98 gld.; Bertil Englund, Svedujo 11.02 gld.; J. Th. de Goey, Nederlando 5.- gld.; D-ro W. P. Roelofs 10.- gld.

Al ĉiuj donacintoj tre koran dankon.

M. H. VERMAAS
Direktorino C.O.

A N O N C E T O J

Koresponda Servo Mondskala. Nuntempe, multaj adresoj haveblaj el Estonio, Francujo, Pollando, Japanujo, Jugoslavio, Bulgario. Skribu indikante viajn sekson, aĝon, profesion al: Daniel Luez, Laon (Aisne), Francujo, kaj enmetu respondkuponon por ĉiu petata korespondanto.

La Navigantoj, Örebro, Svedujo, invitas vin partopreni senkoston korespondan kurson pri la kristana kredo. Kontraŭ respondkuponon — se havebla — vi ricevos belaspektajn prospekton kaj unuan lecionon.

Londona gastejo, agrabla loĝloko. Lito kaj matenmanĝo po 14 ŝ. 6 p. por ĉiu nokto. Prezoj malaltiĝas laŭ loĝdaŭro. Oni parolas Esperanton kaj la francan. D. Bytheway, "Flat Four", 1, Warrington Crescent, London W. 9, Britujo. Telefono Cunningham 4487.

La nova Kristaneco, bazita je la doktrino de sveda sciencisto kaj reformanto E. Swedenborg, enportas certan lumon en la homan animon pri la postmorta vivo kaj pri vera religio bazita je la Biblio kaj ĝia interna senco. Ĝi akordigas la religion kun la scienco. Postulu traktatojn senpage. Aldonu, se eble, resp. kuponon. Adresu: Jan B. Vlach, Luzjicka 21, Praha XII, Ĉeĥoslovakio.

Katolika Esperantisto! Ĉu vi jam estas membro de Internacia Katolika

Unuiĝo Esperantista (IKUE)? Jarkotizo ned. guld. 6.— = 24 steloj aŭ egalvaloro. Membroj ricevas la monate 20-paĝan Esperanto-revuon ESPERO KATOLIKA. Informojn donas la Administracio de IKUE: Frederikstraat 2, Dordrecht, Nederlando.

Pola Geedziga Oficejo havas kiel celon (speciale por geesperantistoj) feliĉege helpi al soluloj kaj diskrete kunigi esperantistajn geedzojn. Skribu al: "Swatka", Łódź, Piłsudska 133, Polujo. Aldonu respondkuponon.

Por letervespero, kiu okazos la 28-an de januaro 1959, bonvolu sendi interesajn ilustritajn bele afrankitajn poŝtkartojn aŭ leterojn. Bonvolu ankaŭ sendi ĉiuspecan freŝdatan materialon por propaganda ekspozicio. Certe respondos. Antaŭdankojn. Société Espérantiste de Lyon, 7 rue Major Martin, Lyon (1) Francujo.

Propagandcele serĉataj Esperantaj glumarkoj ĉiuspecaj kun teksto Esperanta aŭ nacilingva, kaj alicelaj glumarkoj kun Esperanta teksto. Eldonintoj de tiaj glumarkoj bonvolu ĝis fino de 1958 sendi kvanton je valoro de 5 respondkuponoj inkl. de afranko, al Klubo Esperantista en Oslo, Box 942, Oslo, Norvegujo.

Korespondemuloj el ĉiuj landoj skribu multnombre al Bohuslav Novotny, Hlušovice 48 u Olomouce, p. Bohuňovice, Ĉeĥoslovakio, 46-jara fervojlaboristo. Ĉiam validas.

Deziras korespondi kun esperantistoj en ĉiuj landoj Ethel Goldie, 8 Whin Park Road, Aberdeen, Skotlando.

Deziras korespondi kaj interŝanĝi p.k. kaj p.m. kun ĉiuj landoj. Ankaŭ humuran legaĵon kaj infanlibrojn esp. lingvaj. Johannes Schuricht, Elsa-str. 12, Leipzig O. 5, Germanujo D.D.R.

Deziras korespondi J. Šmidt, Cešis str., Riga 31/1, Latvio. Nepre respondos ĉiumanieran ricevaĵon kaj el ĉiu lando.

Rag. Mario Ban, Casella postale 260, Trieste, Italujo, deziras interŝanĝi poŝtkartojn.

20-jaraĝa studento-akordeonisto deziras interŝanĝadi muziknotojn kaj esperantajn librojn kaj revuojn. Andreo Pettyn, Milanówek k/W-wy, ul. Kościuszki 24, Pollando.

"Eta Interpretisto", dekspaga Turisma Frazaro Esperanto-Franca: tri internaciaj respondkuponoj = 105 f. - Lastaj "Esperanto-Parolata", unu rpk. = 35 fr. S-ro Rétot, 162 Bd. Aristide Briand, Montreuil (Seine). Poŝtkonto Paris 1042-07.

Grupo "Esperanto-Geografio", Lycée Turgot, 69 rue de Turbigo, Paris XV deziras 13-17 jaraĝajn korespondantojn.

La Unua Esperanto-lernejo neŭtrala estos en Dover, pordejo de Britujo. Anonco de S-ro Smith.

Aperis 12 belegaj FOTO-AFIŜOJ kun teksto en Esperanto, eldonitaj de U.N.E.S.C.O. okaze de la deka datreveno de la Deklaracio pri la Homaj Rajtoj, la 10-an de dec. 1958. La tutan serion sendas U.E.A. kontraŭ 4 int. resp. kup.	La GRAVURBILDO de Zamenhof farita de Reto Rossetti, kiun montras la kovrilpaĝo de tiu ĉi numero, estas mendebla ĉe U.E.A. je formato 21 × 25,5 cm kontraŭ 0,75 gld aŭ 3 steloj. Ĝi ornamu ĉiujn klubetojn kaj esperantistajn hejmojn!
Via menuo en Esperanto! Aperis GASTRONOMIA TERMINARO de Erhard Urban en lingvoj esperanta, angla, ĉeĥa, franca. 128 p. Prezo: 3,25 gld, 13 steloj MENDU TUJ ĈE U.E.A.	DU MALSANOJ EN ESPERANTO de H. A. de Hoog Interesa libro por ĉiuj lingvistoj La restanta stoko transiris al U.E.A. Kvanto limigita Prezo: 2,90 gld. 11,60 steloj Mendu ĝin ĉe U.E.A.
FREDERICIA ESPERANTO-KLUBO DANLANDO festos la 10-an de januaro 1959 sian 25-jaran jubileon per granda festo. Kun danko ni — propagandcele — akceptas gratulsalutojn. Ni anticipe dankas! La adreso estas: Fredericia Esperanto-Klubo, c/o Havepladsvej 129, Fredericia, Danlando.	LA PLUGILO — bulteno de bruderhofaj komunumoj. Ĝin eldonas grupo de 1500 homoj de 20 naciecoj, kiuj vivas fratece kaj komunece en kvin landoj. Petu senpagan specimenon ĉe: Societo de Gefratoj, Bromdon, Bridgnorth, Anglujo.
Ŝatataj donacoj pro la festotagoj! ANGLA ANTOLOGIO Auld kaj Rossetti, 320 p. 10.- gld. 40 steloj BELARTO Red. W. Auld, 72 p. 3,25 gld. 13 steloj por membroj de UEA 2,75 gld. 11 steloj Mendu ilin frue ĉe U.E.A.!	Libroamantoj kaj libroservoj petu senkoston specimenon de la nova ILUSTRITA KATALOGO pri la propraj eldonaĵoj de ELDONA SOCIETO ESPERANTO Box 7043 Malmö 7 Svedujo

STAFETO

inaŭguras la **Zamenhofan Jaron** per

1 JULIO BAGHY

SONĜE SUB POMARBO

triakta lirika komedio en ses fantaziaj bildoj

Pri tiu 232-paĝa libro skribis

Stellan Engholm :

"La poezio estas vera, sen artifiko, kaj la libro estas la plej granda ĝisnuna atingo de la esperanta poeziverkado"

2 ESPERANTA ANTOLOGIO

POEMOJ 1887-1957

648 paĝoj kun pli ol 350 poemoj de 90 poetoj el 35 landoj de ĉiuj kontinentoj en redakto de

William Auld

prezentas la plej kompletan kolekton de poeziaj ĉefverkoj de Zamenhof kaj de liaj sekvintoj

3 GASTON WARINGHIEN

LINGVO KAJ VIVO

Esperantologiaj eseoj

Elĉerpa analizo de lingvo de Zamenhof
ĉ. 460-paĝa

4 MARJORIE BOULTON

EROJ

(Originala Poemaro)

ĉ. 350-paĝa

La du lastaj sub preso sed baldaŭ aperontaj
Ok aliaj titoloj de STAFETO estas ankoraŭ haveblaj

La librojn liveras la Eldonisto J. Régulo,
UEA kaj ĉiuj libroservoj de la Movado

KUNHELPU PLUFORTI LA TORĈON!

UNIKA SUKCESO

Triumfa marŝo — tiel oni povas nomi la venkoplenan vojon de la belega monata kultura revuo

"NUNTEPA BULGARIO" !

Komencante en 1957 per eldonkvanto de 2000 ekzempleroj, nun ĝi havas jam 11000 abonantojn en 56 landoj de la mondo.

Tiun senprecedencan sukceson ĝi atingis dank' al sia bonega enhavo, luksa eksteraĵo, artoplenaj ilustraĵoj, interesaj Esperanto-rubrikoj, Zamenhofa stilo, malmultekosta abonprezo.

Sed ĉio atingita palas antaŭ la perspektivo, kiu malkovriĝas antaŭ tiu perlo de nia gazetaro.

Dum 1959 "**Nuntempa Bulgario**" aperos en **48 paĝoj**, krome ĝi havos kovrilon.

Ĝi estos presata per profunda kupropreso, multkolore kaj belarte, kiel la plej elstaraj ilustritaj mondevuoj.

La eldonkvanto de 20000 ekzempleroj ebligas la saman malkaregan jarabonon, kiel ĝis nun :

1,5 USA dolaroj aŭ egalvaloro en ĉiu nacia valuto. Al societoj kaj kluboj, kiuj mendas pli ol 20 abonojn, oni faras specialan rabaton de 15%.

Abonu tuj ! Ne prokrastu ! Garantiu la ricevadon de la belega gazeto, mendante ĝin per simpla poŝtkarto !

Mendu ĝin pere de U.E.A.

"Nuntempa Bulgario" str. Levski, 1, Sofio

RETORIKO

kun aparta konsidero al esperanta parolarto

de

IVO LAPENNA

Dua Eldono reviziita kaj kompletigita

Eldono de la aŭtoro

Prezo : 11.— gld. bindita

44.— steloj

9.— gld. broŝurita

36.— steloj

Mendu ĉe U.E.A.

aŭ ĉe la aŭtoro



Por la Libro-Tago kaj Kristnasko : Belega donaco por vi mem kaj aliaj !

Presita en Nederlando ĉe Zwagers, Rotterdam